

1974 decembro

67-a jaro

n-ro 828 (12)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando

CENTRO
DE ESPLORO
KAJ DOKUMENTADO
PRI LA MONDA
LINGVO-PROBLEMO

esperanto en perspektivo

FAKTOJ
KAJ ANALIZOJ
PRI LA INTERNACIA
LINGVO

LONDON
ROTTERDAM

1974

Vi trovos

Kvar monatojn post sia elektigo, la nova prezidanto de UEA, d-ro H.R. Tonkin, skribas pri la estonta agado kaj elstarigas la ĉefajn taskojn. En ampleksa artikolo d-ro R. Corsetti traktas niajn ŝancojn en Afriko. Pro la ĉeesto de plurpaĝa indekso, la varieco de ĉi tiu numero ne estas modela, kvankam legindaĵoj ĉeestas.

Enhavo

- 201 Pri la estonta agado: Prioritataj taskoj de la Movado (d-ro Humphrey R. Tonkin)
- 202 Grava paŝo de belgoj: Kolektive
- 203 Afriko, ĝiaj lingvoj kaj nia Movado: La neplugita kampo (d-ro Renato Corsetti)
- 206 Belartaj Konkursoj: Stimulilo por progresigo (Baldur Ragnarsson, Belartaj Konkursoj 1975: La dudek-kvinan fojon)
- 207 Internacia lingvistika simpozio: Meta-lingvo, Rumanio: Nova lernilo
- 208 Informoj de CED: Londono (prof. d-ro Ivo Lapenna), Roterdamo (prof. d-ro Jonathan Pool)
- 210 Recenzoj ("Prefiksitaĵoj el Zamenhof", "Konsideroj", "Noveloj de Lusin"), Belartaj Konkursoj 1974, Originala Poezio (Tria Premio): La migranto (Ueyama masao)
- 212 Laste aperis . . . , Kalendaro de Esperanto-aranĝoj en 1975
- 213 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 60a UK en Kopenhago
- 214 TEJO-paĝo: La 31a Internacia Junulara Konferenco de TEJO: Sur la dana vojkruciĝo, Nova seminario de KER: La necesa reekzameno
- 215 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 216 Nekrologoj (Broise, Wannemakers, Fernández Menéndez, Banham, Wiltshire, Hérion, Goodliffe), Oficiala informilo, Anoncetoj
- 218 Indekso de la 67a jarkolekto de nia revuo

La kovrilo

"ESPERANTO EN PERSPEKTIVO: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo", la longe atendata monumenta verko de CED, verkita de prof. d-ro Ivo Lapenna (ĉefredaktoro), Ulrich Lins (redaktoro) kaj Tazio Carlevaro, aperis komence de decembro 1974, ĝustatempe por ke ĉi tiu libro de la jardeko fariĝu LA libro de la Libro-tago. Sur siaj 876 paĝoj, ĉi tiu enciklopedieca volumego enhavas ĉion sciindan pri la historio, la nuna stato kaj la estonteco de la Internacia Lingvo kaj ĝia movado. La libro viciĝas inter la plej imponajn volumojn iam produktitajn en Esperanto. Presita sur luksa papero, kun 65 paĝoj da ilustraĵoj kaj 40 paĝoj da indeksoj, en fortika bindaĵo kun plastumita kovrilo — ĉio en moderna grafika vesto — ĉi tiu libro estas siaspeca defio al la hodiaŭa Esperanto-movado kaj ĝia libro-merkato. Estante necesa manlibro por ĉiu aganto sur la kampo de la Internacia Lingvo, per la rapideco de sia disvendiĝo "ESPERANTO EN PERSPEKTIVO" klare demonstros la forton de la movado kaj iasence nombros la aktivulojn, pri kiuj la nuna Esperanto-movado povas kalkuli.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Telefona: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: S. Milojević.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonctarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam-3002, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA)

Estrararo de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne, PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germ., tel. (040) 7 38 45 08.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegujo; tel. (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B 3581 Achel, Belgio; tel. (011) 64 31 50.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B 4000 Liège, Belgio; tel. (041) 27 00 79.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m. 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 74 12.

Prioritataj taskoj de la Movado

LA PRIORITATOJN de la venonta periodo de nia agado oni povas difini laŭ diversaj manieroj. En ĉi tiu artikolo mi deziras emfazi tri specialajn punktojn, kiuj troviĝas inter la ĉefaj ecoj de sukcesa amasmovado kiel la nia. Tuŝante tiujn tri punktojn, mi ankaŭ prezentos al vi plurajn prioritatojn por specifaj aktivecoj, kiuj ŝajnas aparte gravaj ĝuste nun.

1. La atingoj de la internacia Movado devas respeguliĝi en la naciaj kaj lokaj movadoj: Nur per forta organiziteco je ĉiuj niveloj la tuta Movado progresos.

La plifortigo de la Asocio dum la pasintaj dudek jaroj ŝuldiĝas ĉefe al sistema kaj serioza pritrakto de niaj problemoj kaj perspektivoj, post analizo kaj planado. UEA fariĝis gvida, profesia organizo. Sed la federacio, de kiu ĝi estas la kunliga ero, nome la Esperanto-movado mem, ne ĉiam povis partopreni en tiu plifortiĝo kaj plivastiĝo. La tasko de la tuj venonta periodo estas samtempe plisolidigi la gajnojn, kiujn faris UEA en la strebado por Esperanto, kaj disvastigi en la kadro de la landaj asocioj kaj lokaj grupoj la efikojn de tiuj gajnoj. Forta UEA sen fortaj landaj asocioj kaj forta loka agado estas nulo. Speciale je la nacia nivelo la agado devas esti efika, trafa kaj celkonscia.

Progreso devas okazi je ĉiuj niveloj de la Movado samtempe. Tio signifas, ke en la Movado ne restas loko por rivalecoj inter landaj asocioj aŭ inter la nacia kaj internacia agadoj. Nek ekzistas loko por superflujaj duobligoj. La diversaj landaj asocioj devas intensigi la horizontalajn kontaktojn inter si (kiel jam okazas ekzemple en nordokcidenta Eŭropo), kaj kunlabore kun UEA identigi tiujn taskojn plej efike plenumebajn de la centra UEA por la bono de la tuto. UEA mem devas egale diligente rilati al la landaj asocioj, proponante servojn, persvadante al agado, kunordigante la diversajn iniciatojn. Ĝi devas esti samtempe firma gvidanto kaj lojala servanto. Por fari tion efike, necesos ankaŭ internaj ŝanĝoj: pli efika kunordigo de la laboro de la Komitato de UEA, reformo de la membrokategorioj, glatigo de la administrado, modernigo de la kongresoj (ĉi-lastaj sub gvido de nia estraranino, d-ro Szabó-Felső). Necesos ankaŭ krei pli firman financon bazon por la tuta Movado, kaj speciale por UEA. Ni atingis punkton en la ekonomia kaj organiza evoluo,

kie la simplaj kontribuoj de la membroj, en la formo de kotizoj, ne plu sufiĉas por kovri la multflankajn aktivecojn de la Asocio. Ni devas do trovi tute novan financon bazon, de kiu la kotizoj de la membroj estos nur parto. La Estraro de UEA nun ellaboras detalan planon por la kreo de tiu financa bazo, kaj tiu plano estos prezentita al la membraro en 1975. Mi mem gvidas tiun agadon, kun helpo de nia estrarano pri financoj, s-ro Woessink, kaj la Financa Komisiono. Pri kunordigo de landa agado okupiĝas d-ro Bormann, nia vicprezidanto, kune kun komisiono pri tiu agadkampo. La ĝenerala sekretario, s-ro Wensing, aparte okupiĝas pri internaj administraj plifortigoj.

2. En la klopodoj konkeri novajn kampojn kaj enpenetri novajn mediojn, ni ne neglektu la malnovajn: Novaj iniciatoj devas baziĝi sur konservado de niaj jamaj atingoj.

Tiu ĉi punkto estas tro ofte neglektata de niaj fervoraj agantoj. Entuziasmo pri iu nova radio-elsendo foje dronigas nian memoron pri iu Romo aŭ Vieno, kiu jam dum jaroj parolis al ni; nova lerneja kurso estas prezentata kiel gajno dum malnova forvelkas; nova kaj efemera eldonaĵo forpuŝas tiun aŭ alian tradicion entreprenon; nova registara agnosko okazas en vakuo, ĉar pli fruajn agnoskojn en aliaj landoj oni ne ekspluatis ktp. Estas nenia dubo, ke iuj novaj kampoj bezonas nian atenton — precipe komerco, parlamenta agado kaj universitata agado. La unua, malgraŭ antaŭaj klopodoj (kaj speciale la lastatempa aperigo de *Internacia komerca-ekonomika vortaro*), estas kampo ĝis nun apenaŭ plugita. La dua estas la nacia ekvivalento de la agado ĉe interregistaraj organizoj kiel Unesko kaj UN, kaj postulas paralelan subtenon de UEA. La tria agadkampo, tiu en la universitatoj, estas nepraĵo por ĝenerala akceptiĝo de Esperanto kiel studobjekto ankaŭ en la mezgradaj lernejoj. Sed tiuj novaj agadoj, en kiuj rolos plurfacete la Estraro de UEA, ne okazu kun neglekto de la jamaj atingoj en la lernejoj, en la informado, en la kultura kampo. Male, tiujn jam establitajn agadojn ni eĉ pli-intensigu. La informado, ekzemple, bezonas ĝisfundan plifortigon, sub gvido de nia estrarano pri tiu aktiveco, s-ro Ŝwistak, tiel ke UEA ludu pli aktivan rolon en la liverado de materialo, ideoj kaj spertoj al la landaj asocioj, kaj la landaj asocioj pli proksime kunlaboru en la funkciigo de taŭgaj informaj fakoj.

3. Ni devas utiligi ĉiujn niajn homajn fortojn ĝis maksimumo: La homoj kontribuu laŭ siaj talentoj, kaj neniu, kiu pretas labori, estu forpuŝita de la laboro.

La inflacio de la pasintaj kelkaj jaroj, kaj speciale la kresko en la kosto de servoj, en multaj landoj altigis la kotizojn de volontulaj organizoj: Granda parto de la interesitoj pri Esperanto, kaj eĉ aktivaj esperantistoj, fariĝis neorganizitaj, sen formalaj ligoj al la aktiva Movado. Kvankam kelkaj landaj asocioj aliris tiun

problemon per specifaj rimedoj, la bezono etendi nin denove al ĉiuj niveloj de la Esperanto-movado estas akute evidenta. Necesas, ne nur en UEA sed ankaŭ en la landaj asocioj, reformo de membrokategorioj, de agmanieroj, de konceptado pri la rolo mem de landa asocio.

Kelkaj homoj forlasis la organizitan Movadon, ĉar ili nenion interesan trovis en ĝi. Kiam premis devoj familiaj aŭ profesiaj, aŭ kiam ili trovis novajn interesojn, ili simple fordrivis. Unu el niaj ĉefaj taskoj estas rekapti la intereson de tiuj homoj — ne simple per organizitaj kampanjoj, sed per internaj reformoj en la asocioj por igi tiujn asociojn respondemaj al la bezonoj kaj interesoj de plej diversaj homoj. Tie ĉi fakaj aktivecoj gravas, ĉar en tiu agado ankaŭ la nuraj uzantoj de Esperanto trovas sian intereson. Pro tiu graveco, la nova Estraro dediĉis la fortojn de unu el la vicprezidantoj, prof. d-ro Støp-Bowitz, speciale al la faka agado. Gravas ankaŭ agado en popularaj medioj. Elektome sed kuraĝe, ni subtenu popularajn iniciatojn por Esperanto-kanzonoj, esprimiĝoj de la junularaj "kultoj", sportaj aktivecoj.

Aliaj homoj, pretaj agi por Esperanto, forlasis la aktivan Movadon ĉar ni misuzis iliajn talentojn. En la nuna tempo ni ege malŝpare utiligas niajn limigitajn

homajn fortojn. Jen ni postulas, ke homo talenta pri unu fako laboru en tute alia; jen ni permesas niajn personajn sentojn interveni inter ni kaj laborema eventuala kolego; jen ni lasas al iu homo labori en evidente malfekunda grundo, dum apude fekunda grundo restas nekultivata. En ĉiuj volontulaj organizoj, la spirito de kamaradeco, de amikeco, estas grava — sed ni memoru, ke ni laboras ne pro niaj propraj amikecoj sed pro Esperanto kaj ĝia idealo. Kiam temas pri laboro en misaj terenoj, tio estas evitebla per efika edukado de niaj agantoj — ankoraŭ iom neglektata fako.

Ni rapide trarigardis tri ecojn de sukcesa movado: interrilito de ĉiuj niveloj de agado, konservado de jamaj atingoj paralele kun entreprenado de novaj iniciatoj, kaj maksimuma utiligo de niaj homaj fortoj. Ili povas formi bazon kaj celon por la estonta agado de la Asocio. Ilia realigo dependos ne de la Estraro, aŭ de la Komitato, aŭ de tiu aŭ alia landa asocio, sed de ni ĉiuj, en harmonia kaj celkonscia kunagado.

Humphrey R. Tonkin
prezidanto de UEA

GRAVA PAŜO DE BELGOJ:

Kolektive

UNIVERSALA Esperanto-Asocio havas entute pli ol 32 000 membrojn. Tio estas nombro certe ne impona, el monda vidpunkto, sed almenaŭ atentinda. Ĝi estas nombro, kiu povas jam allogi komercan reklamadon, malgraŭ ke la unuopaj membroj estas dissemataj tra la tuta mondo, en diversaj ekonomiaj sistemoj kaj valutaj merkatoj. Ankaŭ por kultura movado, kiel tiu por la Internacia Lingvo, tia nombro estas jam signifa, ĉar 32 000 personoj laborantaj organizite por iu komuna celo prezentas forton, kiu kapablas multon atingi.

Bedaŭrinde, la ligiteco inter tiuj 32 000 estas sufiĉe malforta. El ili, nur ĉirkaŭ 7 000 estas individuaj membroj de UEA, kaj nur iom pli ol 6 000 ricevas la revuon *Esperanto*. La ceteraj estas t.n. asociaj membroj, t.e. membroj de landaj asocioj aliĝintaj kolektive al UEA. Estas kompreneble, ke revuo kun 6 000 legantoj ne havas tian intereson por la komerco (de kies pagitaj anoncoj dependas finance granda parto de la monda gazetaro), kian ĝi havus, se temus pri 32 000.

En la Estraro de UEA plurfoje releviĝis lastatempe la demando, kiel plivastigi tiun ligitecon inter la aktivaj membroj. Estas klare, ke estus naive esperi, ke ĉiuj membroj de la landaj asocioj fariĝos individuaj membroj de UEA. Jam la nura kosto de duobla kotizado grave limigas la atingeblan nombron. Aliflanke, kiel

montris la debato pri tiu temo en la hamburga kongreso, tiu duobla kotizado ofte respegulas ankaŭ superfluan duobligon de la laboro: pluraj organoj de landaj asocioj nur pene sin vivtenas, liverante al la membroj informojn kaj novaĵojn, kiujn ili trovas ankaŭ en la internacia Esperanto-gazetaro.

El tiaj konsideroj naskiĝis tute nova aranĝo, ĵus formulita en kontrakto inter UEA kaj Belga Esperanto-Federacio. Laŭ tiu interkonsento, UEA liverados dum 1975 la revuon *Esperanto* al ĉiuj membroj de BEF kontraŭ grave rabatita abonkoto, tiel ligante la asociajn membrojn de BEF rekte al la internacia Movado. Siaflanke, BEF garantias al UEA 300 pliajn abonantojn, tiel altigante la eldonnombron de la revuo *Esperanto* (kaj farante ĝin komerce pli alloga al reklamantoj), kaj ŝparos la kostojn de aparta produktado de landa organo kun malgranda eldonkvanto. Kiel interna ligilo de BEF kaj kiel informilo al la ekstera publiko plue aperados nur nacilingva bulteno.

Ĉi tiu eksperimento komenciĝos nur ekde la januara numero. Tamen ĝi jam nun vekis la interesiĝon de pluraj aliaj landaj asocioj, kiuj povus trovi ĝin imitinda.

DANKON BETTY!

Jam dum pluraj jaroj f-ino Betty Salt el Kanado grandanime subtenas la Asocion. En la pasinta jaro ŝi donacis 4 300 guldenojn por premii novan prozan verkon (pri kio ni raportos poste), kaj nun venis nova donaco de 2 600 guldenoj.

La neplugita kampo

Inter la plej aktivaj komisionoj de la nova Komitato de UEA troviĝas tiu, kiun gvidas d-ro Renato Corsetti, komisiito pri la regiona agado. En ĉi tiu artikolo li skizas la nunan lingvan situacion en Afriko kaj kritike esploras niajn ŝancojn en la vekiĝinta kontinento.

EN MEZEPOKAJ MAPOJ oni kutimis skribi sur la teritorio de subsahara Afriko “Tie ĉi estas leonoj”, por elegante kaŝi la absolutan nescion pri tiu kontinent-parto. Se UEA nun eldonas mapojn el la vidpunkto de la disvastiĝo de la Internacia Lingvo, ĝi devus skribi samloke “Tie ĉi estas neesperantistoj”. Fakte je ĉies granda bedaŭro Afriko estas ankoraŭ neesplorita lando por ni, aŭ almenaŭ lando kun la minimuma denseco de Esperanto-parolantoj, malgraŭ tre viglaj iniciatoj florintaj tie jam dum la unuaj jaroj de tiu ĉi jarcento (Esperanto-gramatiko por arablingvanoj ekzemple, estis eldonita jam en la jaro 1908). Antaŭ ol ekzameni la eventualajn eblecojn, kiujn ni havas en Afriko, estas tamen oportune havi ian bildon pri la tiea lingva situacio en kiun ni volas enpuŝi la Internacian Lingvon.

Ĉu vere centoj da lingvoj?

Afriko estas vera “eldorado”, vera ormineja lando, por homoj, kiuj ŝatas esplori kaj pridokumenti lingvajn problemojn, kaj inter ni verŝajne estas multe da tiaj homoj. Dum la koloniisma epoko, eŭropaj lingvistoj ade provis persvadi kaj eŭropanojn kaj afrikanojn pri la granda multeco de “tribaj” lingvoj reciproke nekompreneblaj, kiuj malhelpus ĉian ekstergrupan komunikadon. La nur parta vereco de tiu aserto estis tamen tuj kaptata kaj ekspluatata de la regantaj fortoj, por pravigi lingvajn politikojn, kiuj baziĝis ĉefe sur eŭropaj lingvoj kaj celis eŭropigi afrikanojn por ilin pli bone kateni al la metropoloj.

Malbonŝance tiuj lingvistoj, helpantaj sialandajn koloniismajn klopodojn, foje pretervole, sukcesis konvinki ankaŭ kelkajn elitajn afrikanojn, kiuj post la sendependiĝo daŭrigis en lingva kampo la antaŭan eŭropan politikon. Bonŝance iom post iom ili rimarkas, aŭ estas devigataj de la objektivaj faktoj rimarki, la strangecon de tio, kion ili faras, kaj novaj solvoj en la intereso de afrikaj popoloj ekaperas. Pro tio ni nuntempe trovas en Afriko aron da diversspecaj lingvaj situacioj, kiuj tamen estas klasifeblaj en kelkaj ĝeneralaj kadroj. Kompreneble per simpliga skemo oni sukcesas havi ĝeneralan bildon, sed tiu bildo ne spegulas plene la realon, kiu precipe en Afriko estas multifaktora; tamen en ĉi-speca artikolo ni ne povas fari alie.

Utiligante skemon proponitan de la fama socilingvisto Ĝoŝŭa Fiŝman, ni povas dividi la landojn en tri grupojn, laŭ la politika decido pri la lingvoj uzendaj en ili.

La A-specaj landoj estas tiuj, kiuj post sendependiĝo, do post formala ŝtatiĝo, alprenis eŭropan ekskolonistan lingvon kiel oficialan lingvon. Ekzemplojn donas Kamerunio, Ganao, Gambio, Dahomeo kaj pluraj aliaj. Profesoro Fiŝman atribuas tiun decidon ĉefe al la arbitreco de la limfiksado por la novaj landoj; tiuj limoj respegulas malnovajn administrajn unuojn, starigitajn dum la koloniisma epoko konsidere de tiamaj administraj bezonoj kaj senkonsidere de etnaj, lingvaj kaj kulturaj trajtoj de la lokaj popoloj. Do, pro manko de unueco, de komuna historio, de iu unuiga forto, kion Fiŝman nomas “(komuna) granda tradicio”, la reganta elito ne povis ne alpreni fremdan lingvon, se ĝi deziris, ke la nova ŝtato funkciu kaj ne disfalu en malgrandajn erojn. La fremda lingvo estis la nura ebla unuigilo de la multspecaj civitanoj, kiuj sentis lojalecon nur al sia loka komunumo.

Ne estas tiu ĉi la taŭga loko por prikomenti la ideojn de Fiŝman, tamen mi ne povas ne aldoni, ke, krom la aluditaj kialoj, en la menciitaj landoj rolis ankaŭ politikaj fortoj, kiuj puŝis al A-specaj decidoj ankaŭ en landoj kie objekte ekzistis lingva kaj kultura homogeneco, aŭ kie la malsamecoj ne estis tiel grandaj kiel oni montris. Por kies intereso agis tiuj fortoj, kiuj apartenas al novkoloniismo, ne necesas diri. Kiel ekzemplojn ni menciis la kazojn de Ruando, Burundio kaj Malagasio. Fiŝman, kiel cetere multaj aliaj lingvistoj, emas subtaksi la brutale politikajn faktorojn, verŝajne ĉar tiu kampo estas dornoplena kaj neniuj ŝatas esti pikita.

La B-specaj landoj estas tiuj, kiuj post sendependiĝo deklaris oficiala lokan lingvon. Ĝenerale temas pri landoj, kie jam antaŭ la alveno de la eŭropaj “civilizantoj” ekzistis politika kaj kultura unuo, kutime ligata al difinita lingvo. B-specajn landojn oni pli ofte renkontas en Azio. En Afriko Alĝerio kaj Etiopio estas ekzemploj. Al ili aldoniĝis lastatempe Tanzanio kaj Somalio. Pri Libio kaj ties lingva politiko dum la lastaj kelkaj jaroj ne necesas paroli, ĉar ĉiuj legantoj de nia revuo havis eblecon iom sekvi ĝin. Kompreneble, la eŭropa lingvo kutime pluhavas fortan pozicion en la internaciaj rilatoj de B-landoj.

Ni ne eniras la problemaron kunligitan al la elekto de loka lingvo, ĉar por niaj celoj ĝi ne estas tre grava. Kutime temas pri elekto inter arkaika, glora, literatura lingvo (t.n. “alta”) kaj nuntempe parolata formo de

ĝi (t.n. “malalta”). Ĉu, ekzemple, oni instruu en alĝeriaj lernejoj la koranan araban aŭ alian araban — ĝian popolan formon?

Ekzistas fine, laŭ la tie ĉi uzata skemo, ankaŭ C-landoj, kie oni agnoskas plurajn “grandajn tradiciojn”, kaj sekve plurajn lingvojn, kiuj estas esprimiloj de tiuj apartaj kulturoj. Do oni oficialigas por regionaj bezonoj ĉiujn tiujn lingvojn, kaj ankoraŭ unu lingvon por tutŝtata komunikado. Tiu lingvo povas esti eŭropa (la angla en Hinda Unio) aŭ unu el la lokaj.

Do, ĉiu afrika lando povas esti, kelkfoje kun iom da perforto, klasifita en unu el la tri priparolataj specoj. Sudafrika Respubliko, kie oni agnoskas kaj fakte uzas la afrikansan, la anglan kaj kelkajn bantuajn lingvojn, estas escepta pro pluraj kialoj, kaj estus pri-traktinda aparte.

Tamen, krom la ĉi-supra statika, senmova, bildo povas interesi nin malkovro de la evoludirektoj, ĉar fakte evoluo okazas kaj kelkfoje eĉ tre abrupte malgraŭ ĉiuj saĝaj kaj “sciencaj” antaŭvidoj de la kutimaj eŭropaj lingvistoj. (Ekzemple Somalio decidis ŝalti sin de angla, itala kaj araba trilingveco al la somala, kaj la decido estis efektivigita en la daŭro de kelkaj monatoj, dum oni en Eŭropo ankoraŭ disputis pri la taŭgeco de la neniam skribita somala lingvo por scienco kaj tekniko).

Nu, en la lastaj dek jaroj, en Afriko oni povis observi malrapidan sed firman evoluon de A-specaj al B-specaj decidoj. Multaj landoj kiuj pensis solvi ĉiujn siajn problemojn per adoptado de eŭropa lingvo, devis finfine agnoski, ke malgraŭ ĉiuj klopodoj, malgraŭ diversflankaj “filantropiaj” helpoj per libroj kaj per instruistoj, malgraŭ la bonvola helpo de UNESKO, ne pli ol 1%, 2% aŭ maksimume 3% de la homoj sukcesis regila eŭropan lingvon. En kelkaj kazoj ekestis — sen oficiala apogo, tute nature — loka interlingvo. Tia estas la kazo de Senegalio, kie la ŭolofa lingvo konkeris preskaŭ la tutan landon, dum oni klopodis disvastigi la francan. Do ankaŭ la plej obstinaj registaroj ek-venas al konsiderado kaj apogado de afrikaj lingvoj. En preskaŭ neniuj landoj, tamen, oni jam inklinas al C-decidoj, tio estas al agnoskado kaj favorado de ĉiuj ekzistantaj kulturoj, inkluzive de tiuj minoritataj. Ni povus priskribi la nunan etoson en Afriko rilate difinadon de politikaj kaj administraj unuoj per la nocio “ŝtatismo”. Alivorte, en la menso de afrikaj gvidaj intelektuloj kaj politikistoj superregas nuntempe la neceso firmigi la arbitre fiksitajn landlimojn, kvankam tio povas ŝajni paradoksa. Ĉiuj konsentas, ke tiuj limoj estis foje preskaŭ krime desegnitaj sur mapoj, sed samtempe ĉiuj klopodas doni al la nove bakitaj ŝtatoj firmecon kaj unuecon, kaj ĉiu sinapartiga regiona movado estas draste likvidata. Pensu nur pri la militoj en Zairio, Niĝerio, Sudano ktp., kaj pri la starpunktoj tiutempe esprimitaj de ne rekte koncernataj afrikaj registaroj.

Nekompreneo de la afrika kultura identeco ne rajtigas al neado de ĝiaj ekzisto kaj valoro.

Ĉe tia etoso estas malfacile pensi, ke dum la tuj venontaj jaroj “minoritatoj” (por uzi esprimon aplikatan en Eŭropo) ricevos agnoskon kaj eblecojn evoluigi sian propran apartan lingvon kaj kulturon. Tio ne signifas, ke ĉiam estos tiel, male vidiĝas signoj pri renaskiĝo de lingvoj longan tempon subpremitaj, ekz. en Etiopio. Tamen, certe pasos multaj jaroj antaŭ ol la afrikaj ŝtatoj sentos sin sufiĉe fortaj por permesi al si mem favori “minoritatajn” lingvojn. Cetere, en Eŭropo mem, post pluraj jarcentoj de centrecata regado, Francio timas ellasi plenan egalrajtecon por nefrancilingvaj minoritatoj.

Nur kelkdeko da esperantistoj

En tiel komplika lingva situacio, ĉu Esperanto povas ludi rolon? Kaj, se jes, kian? Por respondi la demandojn, necesas unue konsideri la homojn sur kiuj plua progreso de la Internacia Lingvo en Afriko baziĝas, tio estas la afrikaj esperantistoj.

Ekzistas areto da landoj en kiuj estas deko(j) da esperantistoj. Tiuj landoj estas Egiptio, Zairio, Sudafrika Respubliko kaj Malagasio. En tri el tiuj landoj devus ekzisti, laŭ ŝajno kaj laŭ jarlibroj, ankaŭ esperantistaj organizaĵoj, en kiuj grupiĝas la aluditaj dekoj. En kelkaj aliaj landoj (inter dek kaj dek kvin) ekzistas unu aŭ du izolitaj esperantistoj. Mi pensas pri Senegalio, Tunizio, Mozambiko, Etiopio ktp. En ĉiuj aliaj landoj de Afriko vi vane klopodus trovi verdan stelon en ies butontruo.

Por ekhavi imagon pri la malfacilaĵoj, kiujn renkontas afrikaj esperantistoj, vi pensu pri vi mem kiel sola esperantisto en via lando. Pensu, krome, ke kongresoj ĉiam okazas en alia kontinento, ke revuoj estas eldonataj en alia kontinento kaj ke vi malfacile povas transpagi, se entute vi povas, por aboni tiujn revuojn aŭ aĉeti librojn. Kion vi farus en Esperanto en tiaj kondiĉoj? Tamen niaj afrikaj amikoj obstine restas en la Movado kaj nur pro tio ili meritas nian plenan admiron.





Dum la venontaj jaroj UEA klopodos transponti la fendon, kiu ekzistas inter la centraj kernoj de la Movado en Eŭropo, Norda Ameriko kaj Japanio kaj la afrikaj esperantistoj. Por tion fari UEA bezonas ĉies kunlaboron, en ĉiuj formoj, de donacoj de instrulibrooj ĝis personaj kontaktoj de niaj membroj vojaĝantaj al Afriko. Krome, ĉiu esperantista organizaĵo estos petata konsideri en siaj planoj, ke la mondo ne finiĝas ĉe la norda marbordo de Mediteraneo. Tamen, jam nun estus oportune por afrikaj esperantistoj ekkonscii pri si mem kiel organizebla forto, kaj ekkalkuli je siaj propraj fortoj, ne laste por difini la eblan rolon de Esperanto en Afriko, ĉar tio estas ja ilia tasko.

Fakte mi kredas, ke necesa premiso por plua kresko de la nombro de Esperanto-parolantoj en Afriko estas informado, kiu siavice postulas klarajn ideojn pri “kial afrikano lernu Esperanton?”. Sincere, mi ne konas respondojn al la ĉi-supra demando bazitajn sur io alia ol persona intuicio, kaj mi demandas min ĉu entute ekzistas en la Movado homo, kiu sufiĉe pensis pri la demando kaj pri la eblaj respondoj. Laŭ mia scio la “Esperanto-politiko” rilate Afrikon restas ankoraŭ tute prilaborota kaj praktike testota en Afriko por kontroli ĝian efikecon.

Fakte Afriko estas unuo dividata en plurajn sub-unuojn laŭ kulturaj (kaj sekve lingvaj) linioj, kaj tiuj subunuoj malfacile rilatas inter si. Ekzistas arablingva Afriko kaj nearablingva Afriko, kristana Afriko kaj islama Afriko, bantua Afriko kaj nebantua Afriko, franclingva Afriko kaj anglalingva Afriko (tio validas, kompreneble, por elitoj de la koncernaj afrikaj landoj). Tiurilate Esperanto povus multe helpi por kreskigo de interafrika solidareco, kaj por pliigo de interafrikaj kulturaj interŝanĝoj. Mi ja povas facile imagi tutafrikajn kongresojn, kie per Esperanto povus renkontiĝi la multaj malsamaj afrikaj kulturoj. Krome, mi kredas, ke la Internacia Lingvo povus kontribui al pli ekvilibraj interŝanĝfluo inter Afriko kaj la cetera mondo. Nuntempe tiuj interŝanĝoj okazas ĉefe inter unuopaj afrikaj landoj kaj unuopaj eksaj koloniaj metropoloj. Fine, kompreneble, estus uzeblaj en Afriko ankaŭ la kutimaj “hobiaj” argumentoj uzataj en aliaj mondopartoj: “Viaj ferioj estos pli belaj per Esperanto”; “Havu amikojn en la tuta mondo per Esperanto”, “Kolektu poŝtmarkojn kaj korespondu ĉiulanden pri ĉiu temo per anonco en Esperanto-gazeto”, ktp. Mi havas kel-

kajn “antaŭjuĝojn” rilate ĉi-lastajn argumentojn, tamen mi ne neas, ke oni povus altiri homojn ankaŭ per ili. Same, ni devus havi nian starpunkton rilate la fortojn, kiuj okupiĝas pri lingvoj en Afriko, kaj malkovri tiujn, kiuj favoras nin, kaj tiujn, kiuj malfavoras nin. Ekzemple, mi ne dubas, ke ni estas naturaj aliancanoj de tiuj, kiuj klopodas ŝanĝigi lingvajn situaciojn bazitajn sur eŭropaj lingvoj (A-specaj laŭ nia antaŭa skemo) al lingvaj situacioj bazitaj sur lokaj lingvoj. Tiujn homojn kaj asociojn ni devos serĉi kaj informi pri nia agado, subteni laŭ niaj eblecoj kaj kunagi en la kadro de niaj fortoj. Ĉe la samaj homoj kaj asocioj ni povos “testi” la validecon de niaj ideoj pri la valoro de Esperanto por afrikanoj.

Provoj agi laŭgrade kaj planite

Se ni volas nun konkrete vortumi kelkajn eblajn celojn alirindajn kaj verŝajne alireblajn dum la venontaj jaroj, ni povas disdividi ilin, laŭ la tempo bezonata por la plenumo, je longdaŭraj kaj mallongdaŭraj celoj.

Nu, je mallonga templimo, dum la venontaj tri-kvar jaroj, la Movado en Afriko devus pivoti ĉirkaŭ tiuj malmultaj landoj, kie jam ekzistas homaj premisoj, t.e. Egiptio, Zairio kaj Malagasio. Mi kredas, ke ne estus malfacile aranĝi en la menciitaj landoj iuspecan Esperanto-renkontiĝon, kiu estu la okazo por afrikaj esperantistoj koni unu la alian kaj kunordige eklabori. Celo de tiu kunlaboro devus esti unue produktado de informa kaj instrua materialoj en afrikaj lingvoj. Kiel eble plej baldaŭ ni devos principe transiri de la uzado de priesperanta materialo en eŭropaj lingvoj al la uzado de materialo en lokaj lingvoj. Krome, ne devus esti maleble firmigi la jam ekzistantajn organizaĵojn en tiuj tri landoj. Pri la ceteraj landoj, mi kontentus, se post tri-kvar jaroj ni havus organizitajn kernojn en aliaj tri-kvar landoj kie nun ekzistas nur izoluloj.

Je pli longa templimo, ni diru post dek aŭ dek kvin jaroj, ni devus havi en Afriko movadon por la Internacia Lingvo, kiu ne estu simpla paŭsaĵo de la eŭropa, sed movado kun originalaj trajtoj, kaj ĉefe movado engaĝita en la progreso de la landoj en kiuj ĝi agas. Mi estas certa, ke originaleco de trajtoj rezultos el la klopodoj adapti Esperanton al la afrikaj kondiĉoj. Krome, tiu estonta afrika movado, por kiu ni laboru, kontribuos al starigo de pli taŭga ekvilibro inter la malsamaj partoj de la Esperantaj movado kaj kulturo. Nuntempe Afriko apenaŭ estas reprezentita en la Esperanta kulturo, pri kies “tutmondeco” ĉiu el ni pretas veti.

Fine, espereble, tiam la pozicioj de la Internacia Lingvo en Afriko estos sufiĉe fortaj por pluvivi kaj progresi sen bezono de elektera helpo, kaj niaj afrikaj samlingvanoj ne devos daŭre direkti siajn rigardojn al Roterdamo, nek priatenti la kurzon de la guldeno. Kiam tio ĉi realiĝos, ni estos farintaj plian paŝon por efektivigo de la zamenhofa devizo “Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas ĝin nomi tia.”

Renato Corsetti

Stimulilo por progresigo

KONKURSOJ, ankaŭ sur la kampo de la belaj artoj, estas ĝenerale agnoskataj kiel valoraj stimuliloj por la priatentigo kaj progresigo de la koncernaj fakoj. Kiel ĝenerala regulo estas konstatabla ankaŭ la fakto, ke ju pli stimulaj kaj alvokaj ili estas al partopreno, des pli valoraj kaj bonfaraj ili estas por la vasta publiko. Kiel ekzemplon oni povas mencii la Komunajn Nordlandajn Naĝkonkursojn, kiuj kelkfoje ripetigis en la pasintaj du jardekoj kaj multege avancigis la praktikon de tiu bela kaj utilega sporto, la naĝado, en Islando, Finnlando kaj la skandinavaj landoj. Demando estas, ĉu la sama regulo de korelativeco validas ankaŭ por konkursoj de arto; ĉu la striktaj kriterioj tie aplikendaj favoras laŭeble ĝeneralan partoprenon aŭ, male, ĉu ili tion malhelpas; kaj, se eventuale la dua ebleco estas pli laŭ la faktoj, ĉu okazigo de tiaj konkursoj povas havi valoron ankaŭ por aliaj, kaj ne nur por la malmultaj artistoj kaj artemuloj, kiujn la rezultoj de la konkursoj rekte koncernas. Ni rigardu por momento iujn faktojn ĉi-tamajn en rilato kun la Belartaj Konkursoj de UEA.

Laŭ la Regularo de la Belartaj Konkursoj ili "havas la celon evoluigi la artojn en kaj pere de la Internacia Lingvo". Nu, evidentas el la historio de la lastjaraj konkursoj, ke la postulo pri evoluigo apenaŭ trovas tie pravigon, ĉiam pli oftis nealjuĝoj de premioj, kio sciigas pri ĝenerale malalta nivelo de la konkursaĵoj laŭ la opinioj de la juĝantaro; eĉ tutaj branĉoj forfalis (tradukita prozo kaj dramo — fakte branĉoj atendeble la plej "facilaj", — kio atestas pri malkreskanta intereso por la Konkursoj inter ĝuste tiaj ordinaraj emuloj, kiuj tra la tuta historio de Esperanto persiste evoluigis la lingvon per sia transdona laborado). Certe klarigoj de tiaj faktoj estas serĉendaj. Ĉu eble la Regularo estas tro strikta, ne donanta eblecojn de sufiĉa varieco? Por ke la Belartaj Konkursoj servu al la proklamita celo, la Regularo devas esti laŭeble vastkadra, esploranta ĉiujn aktivigajn eblecojn. Tre eble la rajtigo al partopreno en la Konkursoj estas tro limigita; laŭ la Regularo rajtas konkursi nur individuaj membroj de UEA kaj personoj aliĝintaj al la koncerna Universala Kongreso. Estas malfacile kompreni, kial ĉiu ajn

BELARTAJ KONKURSOJ 1975:

La dudek-kvinan fojon

POR SIA JUBILEA JARO 1975, la Belartaj Konkursoj de UEA ŝanĝis siajn prizorgantojn, sed almenaŭ provizore konservis la ĝisnunan strukturon. La konkursaj branĉoj por 1975 estas jenaj:

1. Originala poezio (maksimume 108 versoj en 1-3 poemoj)
2. Traduka poezio (maksimume 108 versoj en 1-3 poemoj)
3. Originala prozo (maksimume 200 tajpitaj linioj po 65 spacoj)
4. Traduka prozo (maksimume 200 tajpitaj linioj po 65 spacoj)
5. Originala teatraĵo (ludodaŭro maksimume 25 minutojn).
6. Traduka teatraĵo (ludodaŭro maksimume 25 minutojn).


Ĝis oni ellaboros novan, validas la ĝisnuna Regularo pri la Belartaj Konkursoj, laŭ kiu ankaŭ en la jaro 1975 la Konkursojn rajtas partopreni

ĉiu individua membro de UEA aŭ aliĝinto al la 60a Universala Kongreso en Kopenhago. Necesas tamen, ke ĉiuj interesitoj pri la partopreno en la Konkursoj atente tralegu la Regularon, kiu troviĝas en la senpage distribuata broŝuro "Statuto kaj Regularoj de UEA".

Ankaŭ por la jaro 1975 en ĉiu unuopa branĉo de la Konkursoj estas antaŭviditaj po tri premioj (100, 70 kaj 40 guldenoj). La gajninto de la premio "Nova Talento" ricevos 70 guldenojn kaj ŝia/lia nomo estos engravurita sur la pokalon de Henry Harabagiu.

Ĉiujn konkursaĵojn oni bonvolu sendi al **LA NOVA SEKRETARIO DE BELARTAJ KONKURSOJ**: s-ro Alec Venture, 55 Park Hill, CARSHALTON, Surrey SM5 3SE, Britio. La limdato por alsendo de la konkursaĵoj estas la 31a de marto 1975.

Kiel konstateble en la apuda artikolo, en 1975 la Belartaj Konkursoj havos novan branĉon **FOTOGRAFIO**. Kvankam pluraj detaloj pri tiu branĉo jam estas konataj, kelkajn teknikajn aferojn necesas ankoraŭ precizigi. Definitivan alvokon por partopreno en tiu branĉo de la Konkursoj vi trovos en la februara numero de nia revuo (post la januara Estrarkunsido), kiam ni verŝajne povos anonci ankoraŭ unu plian branĉon de la Belartaj Konkursoj en 1975.



Maldekstre: Unu el la plej elstaraj nuntempaj poetoj en Esperanto, Baldur Ragnarsson (Islando), fariĝis nova prezidanto de la juĝkomisiono de la Belartaj Konkursoj.

Dekstre: Multjara membro de la juĝkomisiono (prozo), Alec Venture (Britio), transprenis novan taskon en la Belartaj Konkursoj de UEA — li estas la sekretario.



kapabla esperantisto ne rajtas partopreni konkurson, kiu havas bonfaran celon por la lingvo kaj ĝia kulturo ĝenerale. Estas dezirinde havi ankaŭ pli da varieco en la konkursaj branĉoj, kiel fakte la Regularo permesas. Nova branĉo por 1975 estas la fotografio; espereble ĝia aldecido rikoltos riĉe. Sed pli da eblecoj estas esplorindaj; mia peto al la esperantistoj estas, ke ili malavare prezentu al mi skribe siajn proponojn pri novaj konkursaj branĉoj, iliaj kondiĉoj kaj aranĝoj. Ĉiuj seriozaj proponoj estos ekzamenataj kaj konsiderataj el la vidpunkto de eventuala inkluzivigo en la konkursan branĉaron.

Venontjare la Belartaj Konkursoj de UEA trapasos sian 25an datrevenon. Institucio de eĉ tiometa aĝo atendeble staras sur kelka tradiciaro, kaj fakte tiel estas en la kazo de la Belartaj Konkursoj: regularoj, trifoje akceptitaj de la Komitato de UEA (en 1955, 1959 kaj 1965) laŭvice dum jaroj pridecidis la partoprenemon de difinita parto de la esperantistaro kaj la taskojn kaj laborojn de la juĝantaro. Tradicio en si mem ne estas io senkondiĉe bona aŭ malbona; kio gravas estas la kvalito de rezultoj kondiĉigitaj de ĝi, ĉu favore, ĉu malfavore. Antaŭ ĉio, tradicio devas montri vivecon, adaptiĝivon, evolupovon. La vivanteco kaj evoluiga valoro de la Belartaj Konkursoj de UEA dependas de tio, ke ilia daŭre formiĝanta tradiciaro enhavu ĝuste tiajn ecojn.

Baldur Ragnarsson
prezidanto de juĝkomisiono de la BK

Adreso: Sogavegur 170, Reykjavík, Islando.

INTERNACIA LINGVISTIKA SIMPOZIO:

Meta-lingvo

INTERNACIA KULTURA SERVO (IKS) el Zagreb, Jugoslavio, jam nun estas la plej konata “ikso” de la Movado, malgraŭ tio ke ĝi ekzistas nur ĉ. du jarojn. Al la nomo de IKS estas ligita sufiĉe verva eldona aktiveco kaj la jam tradiciaj pupteatraj festivaloj en la ĉefurbo de la jugoslavia respubliko Kroatio. La lasta iniciato de IKS estas internacia lingvistika simpozio, kiun la organizantoj titolas “Esperanto kiel lingvistika bazo de meta-lingvo kaj kiel universala lingva fenomeno”. Probable, la atomfizikaj trajtoj de la titolo klarigos post la simpozio mem, kiu estas planata por la periodo inter la 4a kaj 6a de aprilo 1975 en Zagreb. La simpozion financos jugoslavia Komitato por kunordigo de teknologio kaj scienco, kaj ĝi okazos sub la aŭspicioj de TEJO. La organizantoj planas inviti (jam invitis?) plurajn konatajn nomojn de la Movado (prof. Waringhien, d-ro Isaev, d-ro Szerdahelyi, d-ro Tonkin, prof. Frank, R. Huapenthal k.a.). El la lokaj referontoj al la simpozio oni mencias la nomojn de Rotkvić, Velebit kaj Tišljar; partoprenos ankaŭ membroj de la Zagreba Societo de Lingvistoj kaj lekciantoj ĉe la Universitato de Zagreb. La adreso de la organizanto estas: Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/I, YU- 41000 Zagreb, Jugoslavio. Ni esperas, ke ni en unu el la sekvantaj numeroj de nia revuo povos indiki pli da detaloj pri ĉi tiu aranĝo.

GRAVA ELDONAĴO EN RUMANIO:

Nova lernilo

FINE DE NOVEMBRO venis grava kaj esperiga novaĵo el Rumanio. Temas pri la apero de la verko *Esperanto limbă internatională* de Nicolae V. Bulencea. Gi estas 182-paĝa grandformata analiza studo pri la Internacia Lingvo. En apartaj ĉapitroj la aŭtoro amplekse traktas la fonetikon, ortografion, morfologion kaj sintakson de Esperanto. Kvankam temas pri gramatika studo pli ol pri ordinara lernolibro, pro la fakto, ke la verko de Bulencea enhavas amason da ekzemploj kaj klarigoj en la rumana lingvo, kaj ankaŭ specimennajn tekstojn kun paralela traduko, la libro certe povas roli kiel lernilo diverscela kaj diversgrada, depende de ĝiaj uzontoj. Estas aparte notinde, ke la verko aperis ĉe la ŝtata eldonejo “Editura Litera” en Bukareŝto. Ni ricevis informon, ke la libro aperis en 2 500 ekzempleroj, sed sur la libro mem oni legas la nombron 1 060 kiel eldonkvanton. La nova lernilo estas ankaŭ vendata en la publikaj librovendejoj de Rumanio.

Londono:

“ESPERANTO EN PERSPEKTIVO”

Ĵus aperis la longe atendata *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*. Tiu ĉi verko, kiun CED rigardas kiel kronon de sia multjara esplora kaj dokumenta laboro, konsistas el Antaŭparolo, Nomaro de Kunlaborintoj, ses partoj kun entute 23 ĉapitroj, ĝenerala bibliografio, listo de mal-longigoj, persona kaj tema indeksoj. Ilustraĵoj en diversaj ĉapitroj kompletigas la tekston kaj vigligas la tuton. Kune kun la indeksoj, la libro havas 876 paĝojn. Ĝi estas eldonita en 3 000 ekzempleroj. La vendoprezco estas 84,— guldenoj.

La libro estas verkita de prof. d-ro I. Lapenna (ĉef-redaktoro), U. Lins (redaktoro) kaj T. Carlevaro. La aŭtorojn helpis kvindek da kunlaborantoj en diversaj landoj. Aparte menciinda estas la tre valora kontribuo de Henri Vatré, kiu, aldone al la tema indekso, plej atente tralegis la unuajn kaj postajn presprovaĵojn ĝis la lasta momento, kaj helpis forigi plurajn erarojn.

La interna strukturo de la verko estas tia (v. pri tio en *Esperanto* de novembro 1973, p. 184-185), ke en la estonteco, se CED plu eldonados dokumentojn, tio povos esti plej taŭge farita laŭ la samaj dividoj kaj subdividoj, kiel en *Esperanto en Perspektivo*.

LASTAJ INFORMOJ PRI LA AGADO

CED ekfunkciis la 1an de januaro 1952 kun triobla celo: sciencaj esploroj, dokumentado kaj informado. Pri ĝia agado regule aperadis raportoj aldone al la raportoj de la Estraro de UEA. La lasta raportoj de CED por 1973-74 estis publikigita kiel aldono al la Estrara Raporto por la sama jaro. Post aprilo 1974, konforme al la antaŭe farita plano, ankoraŭ aperis la dokumentoj G/IV/1, G/IV/2, G/IV/3 kaj I/VII/10. Krome, aperis ankaŭ CED/8 kun koncizaj informoj pri la likvido de la oficejo de CED en Londono. Do, CED entute eldonis 396 dokumentojn en diversaj serioj, inkluzive la Serion CED/INT. En aŭgusto 1974 Hispana Esperanto-Federacio publikigis Dok.A/II/1 *La Lingva Problemo en la Internaciaj Rilatoj* de prof. I. Lapenna en la hispana traduko de Inés Gastón. Post la Kongreso en Hamburgo estas katalogitaj 117 pliaj dokumentoj, tiel ke la tuta arkivo konsistis el 4 525 dokumentoj en la momento de la transporto en Rotterdam. Aldone, entute estas katalogitaj ĉ. 5 400 eroj el diversaj periodaĵoj kaj aliaj fontoj. Esencaj informoj pri la laboro de CED kaj ĝiaj publikaĵoj troviĝas ankaŭ en Ĉap. 20.2 de la verko *Esperanto en Perspektivo*.

LIKVIDO DE LA LONDONA OFICEJO

Kiel konate, la fondinto de CED kaj ĝia honorofica direktoro ekde la 1-a de januaro 1952, ekis el ĉiuj siaj funkcioj en UEA, inkluzive la pluan gvidadon de CED. La kaŭzojn de sia ekisigo prof. d-ro I. Lapenna prezentis al la Kongreso en Hamburgo la 31an de julio. Pri tio ekzistas magnetofona bendo. Resumo aperis en diversaj Esperanto-periodaĵoj. La nova Estraro de UEA nomis d-ron Jonathan Pool el Usono kiel agantan honorofican direktoron de CED. Lia ĉefa tasko estos fari al UEA proponon pri la plua funkciado de tiu ĉi institucio.

En ligo kun tio okazis likvido de la londona oficejo de CED. La 14an de novembro, en la ĉeesto de la ekisiginta honorofica direktoro kaj de la direktoro de la CO de UEA, la tuta dokumentaro, libroj apartenantaj al CED kaj unuopaj mebloj, kiujn la direktoro de CO opiniis sufiĉe valoraj por la CO, estis transportitaj en Rotterdam. Sekve la oficejo de CED en Londono ĉesis ekzisti.

Publikigante tiun ĉi lastan komunikon de CED, la ekisiginta honorofica direktoro esprimas tutkoran dankon al ĉiuj kunlaborintoj, kiuj en kiu ajn formo helpis la laboron de CED dum 23 jaroj. Nur dank'al harmonia kunlaborado de ĉiuj estis eble atingi rimarkindajn rezultojn sur diversaj kampoj, fortikigi la pozicion de Esperanto kaj altigi la prestiĝon de UEA, al kiu CED apartenas. Ĉio ĉi estis farita per pli ol minimumaj financaj rimedoj, kiel vidiĝas el la publikigitaj financaj raportoj de CED ekde 1952. Varman dankon meritas ankaŭ ĉiuj unuopuloj kaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj per siaj donacoj ne nur helpis materie tiun ĉi institucion, sed ankaŭ kuraĝigis la laboron. Espereble *Esperanto en Perspektivo* estos abunde utiligata por plua disvastigo de la lingvo, dum ĝia disvendigo helpas finance ankaŭ al CED, ĉar la ekisiginta honorofica direktoro jam longe antaŭ la eventoj en Hamburgo rezignis, favore al CED, pri kia ajn tantiemo.

Donacoj por CED en 1974

	£	p
Sumo ĝis la 31a de majo 1974	262.66	
S-ro E.F. Dean, Britio	10.	—
Gesinoroj Holmes, Britio	3.	—
S-ro E. Burg, Nederlando	2.81	
S-ro H.V. Rasmussen, Danlando	1.40	
S-ro M. Casanoves, Hispanio	6.91	
S-ro G. Becker, Germanio	15.50	
S-ino C. Minnaja, Italio	8.	—
Manley Esperanto-Klubo, Aŭstralio	12.65	
S-ro P. Rijs, Nederlando	2.	—
Sumo ĝis la 31a de oktobro 1974	£ 324.93	

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon, speciale al tiuj multnombraj subtenantoj de CED, kiuj ĉiujare kontri-

buis laŭ siaj eblecoj al ĝia laboro. La sumo de donacoj en tiu ĉi jaro — la plej alta ekde la fondiĝo de CED — montras la aprezon de la laboro de CED en la 23a jaro de ĝia ekzistado fare de personoj, kiuj bone komprenis ĝian gravecon por progresigo de Esperanto.

Prof. d-ro Ivo Lapenna

Rotterdamo:

ESTONTECO DE CED

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) necese eniris transformiĝan periodon post la jam raportita eksigo de ĝia Honorofica Direktoro, prof. d-ro Ivo Lapenna, kiu ne nur gvidis CED, sed mem faris la plimulton de ĝia esplora, dokumenta kaj redakta laboro kaj kunordigis reton de kunlaborantoj dum pluraj jaroj. La fruktoj de tiu laboro troviĝas en la *Dokumentoj* de CED, sur la paĝoj de *La Monda Lingvo-Problemo* kaj la ĵus eldonita verko *Esperanto en Perspektivo*, en la prilaborata nova eldono de la *Enciklopedio de Esperanto*, en la CED-arĥivo ktp. Depost la fondiĝo de CED, ankaŭ ĉi tiu revuo en apartaj rubrikoj raportadis pri la laboro de tiu institucio de UEA.

Dum la transira periodo, la Estraro de UEA faros decidojn pri la estonteco de CED kaj ĝia laborprogramo. Ĉu CED daŭrigu sensange la ĝisnunajn agadojn, ekzemple eldonadon de la *CED-Dokumentoj*? Ĉu oni enkonduku aliajn agadojn kaj labormanierojn? Kio estas la taskoj plej urĝe plenumendaj? Kiom da rimedoj UEA donu al CED, kaj kion CED siavice faru por UEA? Kio estu la formala organizo de CED, kaj kiu(j) direktu ĝin? Por respondi al tiaj demandoj, la Estraro nomis agantan direktoron, kiu havos la taskon, doni al la Estraro raporton kun rekomendoj pri la estonteco. La diskutoj inter interesataj UEA-anoj komenciĝis, iniciatite de ampleksa sugestaro de la prezidanto de UEA, d-ro Tonkin. Legantoj kun ideoj pri la estonteco de CED bonvolu sendi ilin al la aganta direktoro: prof. d-ro Jonathan Pool, Dept. of Psychology, McGill University, P.O. Box 6070, Station "A", Montréal, Québec H3C 3G1, Kanado (adreso valida ĝis aŭgusto 1975). Konsiderinte ĉiujn sugestojn, li preparos provizoran proponon por diskuto inter la membraro antaŭ ol prezenti finan raporton al la Estraro.

ADRESO ŜANĜITA

Post la eksigo de la Honorofica Direktoro, CED ŝanĝis sian oficialan adreson. Anstataŭ la ĝisnuna duopa adreso en London kaj Rotterdam, CED nun havas kiel solan adreson: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. La tuta arĥivo de CED troviĝas nun ĉe tiu adreso sub la prizorgo de la CO de UEA.

LMLP

Per la redaktoriĝo de prof. d-ro Richard E. Wood, la de CED aŭspiciata fakrevuo *La Monda Lingvo-Problemo* komencis forigi sian preskaŭ dujaran aperprokraston. La 2a numero por 1973 estas kompostata kaj la 3a numero baldaŭ kompostota, tiel ke je la fino de 1974 la prokrasto estas malpliigita al unu jaro. Prof. William Orr, ĉe la Universitato Hofstra, komencis labori apud prof. Wood kiel helpredaktoro. En la venontaj numeroj la legantoj rimarkos la enkondukon de iuj novaj rubrikoj. Kiel ĝis nun, *LMLP* aperigados diverslingvajn sciencajn artikolojn pri ĉiuj aspektoj de lingvaj baroj en la mondo, ĉiam kun ampleksaj resumoj en Esperanto. La revuo estas unu el la plej riĉaj fontoj de informoj kaj analizoj por esperantistoj, kiuj deziras pli sperte koni aŭ konigi la problemon, pro kiu Esperanto ekzistas. Ĉar ĝi estas scienca periodaĵo eldonata de Mouton (kaj trovebla en ties katalogoj) estas tute dece, rekomendi al konvenaj bibliotekoj ĝian abonon. Abonoj validas por la koncernaj volumoj, ankaŭ okaze de eldonprokrasto. CED atendas, ke ĝis proksimume la fino de 1975 estos aperintaj vol. 6 (1974) kaj 7 (1975).

KUNLABORANTOJ BEZONOTAJ

La decidoj pri la estonteco de CED devos baziĝi sur la fakta ekzisto de kunlaborantaro preta kaj kapabla efektivigi tiujn decidojn. Estas do grave al CED, jam nun ekscii, kiuj povas kaj intencas en la estonteco kontribui al la laboro. La aganta direktoro kontaktas tiurilate ĉiujn lastatempajn kunlaborantojn de CED. Sed krome, li petas sinanoncojn de ĉiuj legantoj, kiuj deziras estonte kunlabori kun CED. Skribante (adreso ĉi-supre), bonvolu informi detale pri viaj specialaj intereso, scioj, kontaktoj kaj helpopovo.

INTERLINGVISTOJ ORGANIZIĜAS

Post neformala kunsido en la lasta UK en Hamburgo, grupo de personoj, kiuj profesie aŭ eksterprofesie okupiĝas pri la scienca studo de la monda lingvo-problemo el diversaj vidpunktoj, ekorganiziĝis. Ili komencis cirkuligi novaĵletonon kun informoj pri eldonaĵoj, konferencoj, novaj projektoj ktp. La "nula" numero, kiu ankaŭ resumas la ĝisnunan debaton pri la estonteco de CED, aperis en novembro kaj estas senpage havebla de la redaktoro: s-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 146, 5 Köln 80, FR Germanio. Kun ĝi troviĝas demandilo, per kiu oni povas anonci siajn intereson kaj kunlaboremon.

Prof. d-ro Jonathan Pool

**EKDE SIA FONDIĜO CED ĜUIS AD-
RINDAN FINANCAN SUBTENON DE
LA MEMBRARO. CED ANKAŬ ESTON-
TE KALKULAS PRI TIU MALAVARA
SUBTENON DE SIAJ APOGANTOJ.**

Dankinde

Recenzas D.B. Gregor (Britio):

Prefiksitaj Vortoj el Zamenhof, Plena Vortaro Rusa-Internacia, 2-a eldono, 1896, de N. Kawasaki. Osaka: la aŭtoro, 1974. 88p. 18cm. Stencilita.

Per stranga koincido du esperantologoj samtempe en kontraŭaj partoj de la mondo eklaboris super la Vortaro rusa-internacia de Zamenhof. La brita volis ekscii la senafiksajn kunmetaĵojn enirintajn la lingvon en la unuaj tri jaroj (v. *Scienca Revuo*, vol. 25, n-ro 2-3/1974); la japana listigis la kunmetaĵojn, kies unua elemento estas ĝuste afikso (*dis, ek, mal, pra, re*), plus la prepoziciaj kaj kelkaj adverbaj kaj *sin-*. Lia cifero por la afiksaj do (302), kaj la diferenco inter la du studaĵoj ĉe la ciferoj por la senafiksaj (J, post subtraho de 72 jam aperintaj antaŭ la Vortaro, 588; B, pro intenco ellaso de la malpli gravaj, 87) iagrade ebligas pli kompletan bildon. Notindas, ke prefiksita *sen* ĉi tie sekvas *el* kaj *en* laŭ ofteco, anstataŭ esti facile unua ĉe la antaŭaj verkoj; dum *de*, nur dufoje en la du jaroj antaŭe, troviĝas 52foje en la Vortaro, kio eble klarigas la kreskon ĝis 8foje en verkoj de la posta jaro. Strange, ke la Vortaro ne enhavis 54 senafiksajn kunmetaĵojn aperintajn en antaŭaj verkoj, inter ili mirige *kunsento, sendependa, senkondiĉa, senespere, duonhoro, subteni*. (*Denove*, tamen, kiun la esploro malatentis, troviĝas). Pretere, la 2a eld. ŝajne estas identa kun la unua, posedata de BEA (el la biblioteko de Geoghegan).

Kelkiuj malfavore rigardas ĉi tiun kastorumadon en la veprejo de la gramatiko; sed estonta generacio danke miros pri tio, kiel bone dokumentita estas la lingvo.

Mendu ĉe UEA: 2,— (por Nederlando 2,08) gld. plus sendokostoj 10%.

Verva pledo

Recenzas Ulrich Lins (FR Germanio):

Konsideroj (Publika letero pri Esperanto kaj organizado), de Jo Haazen. Antverpeno: la aŭtoro, 1974. 27p. 27cm. Multobligita.

La broŝuro entenas elokventan pledon por “vera universalisma labormetodo” fare de juna belga aktivulo kaj, kiel suplementon, la Trian Bazan Laborplanon de UEA. Plej verve la aŭtoro defendas la bezonon de unueca revuo, t.e. de pli fortika kaj mondvasta *Esperanto*. La realigo de tiu ideo, principe apoginda, sendube renkontos obstaklojn, sed ni certe devas bonveni la estiĝintan diskuton pri la gazetara situacio en la Movado — ĝuste nun, kiam ni estas observantoj de korŝira degenero de iam prestiĝaj naciaj revuoj (tamen, ankaŭ de ĝojinda moderniĝo de aliaj).

La stilo de Haazen estas iom patosa, verŝajne sub influo de la paroladoj de Zamenhof, el kiuj li larĝe citas. Kelkloke la teksto enhavas banalaĵojn (“mi forte pledas por pli bona utiligo de la homa racio”), sed entute temas pri bonintenca verkaĵeto.

Mendu ĉe UEA: 3,30 (por Nederlando 3,43) gld. plus sendokostoj 10%.

BELARTAJ KONKURSOJ 1974 Originala Poezio: Tria Premio

LA MIGRANTO

Migranto
en febla lumo de l' sun' sinkanta
kun kapo peze klinita solas,
nenia sono lin alparolas
sur strando.

Jen laro!
En la krepuska nebul' grizajla
sen sving' la blankaj flugiloj soras,
ĉu migras? Ĉion per mut' ignoras
la maro.

La nun' mergiĝas en obskur',
ankaŭ la futur'.
Kaj revo al morgaŭa tag'
abortas en imag'.

Marbru' obtuza
vibras eĥe tra l' silent'
al viv' meduza.

Jes iam, en la tag' tepida,
survoje al barak' mucida
(min logis ties sentimento)
mi kuŝis por ripoz' ermita.

Al nervo laca, korp' rigida
tra l' truo de la mur' humida
enblovis somerfina vento
kun marodor' sopirincita.

Denove la brila Lusin



Recenzas Robert Kvašňák (FR Germanio):

Noveloj de Lusin, plena kolekto. Pekino: Fremdlingva eldonejo, 1974. 488p. 22cm. Ilus. Bind. Dua kompletigita eldono.

En majo 1942 la ĉinaj komunistoj okazigis profundan diskuton en Jan-An pri kulturo kaj arto. Ĝenerale oni akceptis la starpunkton de Prezidanto Maŭ: "Estas du kriterioj en literatura kaj arta kritikado, unu politika kaj la alia arta..."

Pritraktate sub tiuj kriterioj la verkoj de Lusin prezentas al ni vere interesan bildon pri Ĉinio antaŭrevolucia. La aŭtoro ne priskribas, kiel tion faris liaj antaŭuloj, la iomete malrealajn amoraferojn de la ĝentilula klaso, sed male la vivon de la popolamasoj sub la jugo de senkoraj ekspluatantoj. Li prezentas al la leganto tutan panoramon de ĉina vivo. Mankas nek la problemoj de lerneja instruisto, kiu ne ricevas salajron, nek la spertoj de juna knabo senmona, kiu volas viziti operon. La detaloj pri la ĉiutaga vivo de tiamaj ĉinoj estas superaj al multaj sciencaj raportoj. Eksterlanda leganto povas senti la pulsadon de la mondo de Lusin. (Dank'al bonegaj klarigoj flanke de la eldonisto, eksterlandano havas la okazon lerni multon pri la kutimoj kaj historio de Ĉinio.)

Lusin estas realisto. Li donas multe pli ol naturalistan, fotan rakonton de sia mondo — li analizas kaj klarigas ĝin al la leganto, kiu ofte havas la impreson, ke la aŭtoro diskutas kun li persone. La sola vere grava

demando pri la traduko fakte apartenas pli al la arta, t.e. stila pritraktado. La titolo de la libro estas "Noveloj de Lusin" — sed ĉu oni rajtas nomi tiujn rakontojn "noveloj"? Eŭropanoj, kiuj enmanigas tiun libron, estos milde (kaj de tempo al tempo eĉ feliĉe) surprizitaj per tiu tipe ĉina ĝenro de "noveloj". La ĉinoj nomas ilin "xiao-shuo" — etaj diraĵoj. Kompare al eŭropaj noveloj okazas relative malmulte en la rakontoj de Lusin. Ofte oni eĉ pensas pri poemoj en proza formo. La rakontoj "rakontas" malmulte sed plie "redonas" etoson, moviĝantan pentraĵon, de la ĉina vivo.

La traduko mem estas — kiel ĉio el PR Ĉinio en Esperanto — preskaŭ perfekta. Kelkaj etaj preseraroj ĝenus nur pedanton. Pli grava estas la fakto, ke la tradukintoj ne ĉiam interrilitis kaj tial tradukis unu ĉinan vorton per diversaj Esperanto-vortoj. Oni povas eĉ rekoni, kiuj rakontoj estis tradukitaj de la sama persono. Kaj jen oni rimarkas, ke perfekta traduko centprocente laŭ la senco de la aŭtoro mem ne eblas. Ĉiu tradukisto redonas sian Lusin. Tamen, tiuj malsamaĵoj estas tiom neĝenaj, ke homo, kiu ne komparas la Esperantan tekston kun la ĉina originalo, apenaŭ rimarkos diferencon.

La lingvaĵo estas klara kaj klasika — preskaŭ tro klasika. Ofte, kiam oni atendus neologismon, la tradukistoj ne kreis neologismon sed preferis uzi iomete pli "grand-animan" sed akademie akceptitan radikon. La kelkaj neologismoj havas sian propran klarigon malantaŭe en la libro.

Feliĉaj ni estas havi tiun valoran tradukaĵon en nia lingvo. Espereble ĝi trovos tiom da aĉetantoj, ke la ĉinoj eldonos similan tradukon de la verkoj de Huoran, nuntempa favorato de la ĉina legantaro.

Mendu ĉe UEA: 8,10 (por Nederlando 8,42) gld. plus sendokostoj 10%.

... "Ĉu vi kapablas trinki viskion?"
Ŝia demando kun rideto ĉarma
min embarasis,
sed post hezit' mi provis... tuis
sufokite.

Ŝi ridis gaje, petoleme,
ankaŭ mi tamen
honteme.

... Ni estis junaj.
Kaj nun mi drinkas en solo
en ĉi taverno vilaĝa.
De la migrad' sen konsolo
mi estas venkita,
plie kaduka jam,
tamen min savos la fin' de
ŝablona homdram'...

Susuras sub la ŝuoj sablo blanka,
marvent' matena ĉe l' pinarbo ankaŭ,
en la kvieto sub la sun' ascenda
adiaŭe al la migranto fremda.

La postlasita de l' karulin'
per la karmemor' flegante sin,
kun l' ombro de paseo sur la dorso,
kun kordolor' pro l' pento kaj rimorso,
junecon vantan vane sopirante,
laŭ la senfina voj' foriras lante.

Sunflor'
jam velkis for,
nur rememor'
turmente al la kor'.

Ueyama masao, Japanio

A/II/3: Das Problem der Kommunikation in der Welt
G.F. Makkink, trad. W.F.J. Walther (1974). 20p. 21 cm. Broŝ.
2,70 gld.

Current Esperanto book list (1974) 39+7p. 28 cm. Broŝ.
Anglalingva librolisto havebla kontraŭ \$1,— ĉe Esperanto Book
Service, P.O. Box 508, Burlingame, CA 94010, Usono.

Estonio (1974) K. Itra. El la estona trad. H. Leis. 40p.
Kolorilus. 20p. Broŝ. 1,20 gld. Ĉefpunktoj el la historio kaj
nuna stato de Estonio, kun multaj fotoj.

Gizela kaj Roberto (1974) Bukar. 32p. 21cm. Broŝ. 2,10 gld.
Kvin mallongaj skeĉoj.

Historio de la kontraŭreĝima Esperanto-movado (1974)
Y. Oosima, M. Miyamoto. vii, 355p. Ilus. 19cm. Broŝ. Japan-
lingva studo.

Kalendaro 1975 Kolorilus. 34 x 38 cm. Eld. Guozi Shudian,
Pekino. Dissendata al novaj abonantoj de *El Popola Ĉinio*.

Kial venkis Esperanto? (1931, represo 1974) L. Ĵirkov. 40p.
16cm. Broŝ. 2,40 gld. Studo pri la kialoj de la venko de
Esperanto super Ido.

Língua das Nações, A (1974) B. Egon Breitenbach. 81p. 18cm.
Broŝ. 7,20 gld. Detalaj informoj pri la nunaj stato kaj pozicio
de Esperanto.

Manual del Esperantista argentino (1974) R. Feldman González.
8p. 23cm. Broŝ. 0,72 gld. Konciza prezento de la celoj kaj
eblecoj de la nuna Esperanto-movado, kun sudamerika emfazo
sed utila por ĉiuj hispanlingvaj landoj.

Ni kantas Esperante, 2a volumo (1973) 27p. 21cm. Broŝ.
1,80 gld. 30 kantoj diversaj, kun muziknotoj kaj akord-indikoj
por la akompano.

Premiitaj kaj aliaj noveloj (1974) T. Sekelj. 52p. 17cm. Broŝ.
5,40 gld. Sep originalaj noveloj.

Rostock (1974) Kolorilustrita faldfolio turisma, havebla ĉe:
Rostock-Informejo, Lange Str. 5, DDR 25 Rostock, Germana
Demokratia Respubliko.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe
Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la
netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando
aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la
enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10%
por la sendokostoj.

Kalendaro

Kio? Kie? Kiam?

Januaro

- 04-08 40a Kongreso de NZEA, Christchurch,
Nov-Zelando
- 26-01/2 Vintra feria restado, Maria Alm, Aŭstrio

Februaro

- 02-08 Vintra feria restado, Maria Alm, Aŭstrio
- 06-15 2a Vintra junulara feriado, Inowrocław, Poll.
- 08-15 Skisemajno, Werfenweg ĉe Bischofshofen,
Aŭstrio
- 15-22 Fervojista skisemajno, Bolzano, Italio
- 17-23 Semajno de Internacia Amikeco

Marto

- 27-02/4 Junulara renkontiĝo de JEFO, Mantes-la-Jolie,
Francio
- 29-31 Paska skirestado, Gschwendthütte,
Hohenberg, Aŭstrio
- 29-31 Argentina junulara kongreso, Tukumán
- 31 Limdato de Belartaj Konkursoj de UEA
- 31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas

Aprilo

- 04-06 Lingvistika simpozio pri Esperanto, Zagreb,
Jugoslavio
- 13-15 70a Skota Kongreso de Esperanto, Glasgow,
Britio
- 14 Zamenhof mortis en 1917
- 30 Limdato de Internacia Ekzameno

Majo

- 03-04 Internacia markola Esperanto-renkontiĝo,
Boulogne-sur-Mer, Francio
- 10-16 27a IFEF-kongreso, Villach, Aŭstrio
- 16-27 Internacia feriado, Międzyzdroje, Pollando
- 17-19 Postkongreso de IFEF, Salzburg, Aŭstrio
- 17-19 67a Nacia Kongreso de Esperanto, Tours,
Francio
- 17-19 53a Germana Esperanto-Kongreso, Oberkirch
- 17-19 Sveda Esperanto-Kongreso, Halmstadt
- 23-26 59a Brita Kongreso de Esperanto, Royal
Leamington Spa, Britio

Junio

- 20 Limdato por aliĝo al la 60a UK
- 28-30 Kanada Kongreso de Esperanto, Calgary

Julio

- 04-07 44a Norvega Esperanto-Kongreso, Tromsø
- 13-26 Kurso pri tradukado al kaj el Esperanto,
La Chaux-de-Fonds, Svislando
- 19-26 31a Internacia Junulara Konferenco de TEJO,
Fredericia, Danlando
- 19-26 KELI-kongreso, Jönköping, Svedio
- 20-26 43a Internacia Kongreso de Blindaj
Esperantistoj, Hilleröd, Danlando
- 26 En 1887 aperis la Unua Libro de Esperanto
- 26-02/8 60a Universala Kongreso de Esperanto,
Kopenhago, Danlando
- 26-02/8 48a Kongreso de SAT, Hago, Nederlando
- 27-09/8 Junulara Feriado, Inowrocław, Pollando

Aŭgusto

- 02-12 14a Skolta Monda Ĵamboreo, Oslo, Norvegio
- 09-15 Internaciaj kursoj, Barlaston, Britio
- 11-16 35a Kongreso de IKUE, Romo, Italio
- 31-06/9 FERIA semajno, Maria Alm, Aŭstrio



60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Kopenhago (Frederiksberg), 1975 07 26 – 08 02

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam
-3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Postboks
1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Novstila programo

Laŭ iniciato de la nova Estraro de UEA, ĝia komisiono pri kongresoj kaj konferencoj komencis viglajn opini-interŝanĝojn pri la programo de la Universalaj Kongresoj. Kvankam la rezultoj de tiuj diskutoj evidentiĝos nur en pli longa perspektivo, jam aperis nombro da interesaj ideoj, kaj tre verŝajne jam en Kopenhago respeguliĝos la nova gvidlinio: “eksperimenti kaj diverŝigi”.

Prof. Neergaard – Rektoro de ISU

Profesoro Paul Neergaard, internacie konata specialisto pri plantoj, direktoro de la Dana Instituto de Sempatologio por la Evolulandoj kaj vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, akceptis ofici kiel Rektoro de la venonta sesio de la Internacia Somera Universitato, okazonta en la kadro de la UK en Kopenhago. Proponojn pri prelegoj akceptas la aganta sekretario de ISU: Prof. Jonathan Pool, Dept. of Psychology, McGill University, P.O. Box 6070, Station “A”, Montréal, Québec H3C 3G1, Kanado. Apartan atenton ricevos prelegproponoj pri problemoj de la Tria Mondo, pri virinaj temoj (1975 estas la Internacia Jaro de Virinoj), kultura diskriminacio aŭ interlingvistiko.



Fakaj kunsidoj jam anoncigitaj

La bunta diverseco de la fakaj kaj specialaj kunsidoj ĉiujare viziteblaj en la kadro de la Universala Kongreso estas unu el la plej fortaj trajtoj de ĝia “universaleco”. Por Kopenhago jam komencas longiĝi la listo de tiaj kunsidoj – kunsidoj de funkciuloj de landaj asocioj, de landaj agantoj en Afriko, Azio kaj Sudameriko, de la junulara sekcio de UEA, TEJO, de aŭtomobilistoj, medicinistoj, Espermenso, muzikistoj, skoltaj, kristanoj, Eŭropa Esperanto-Centro, interlingvistoj, milit-rezistantoj....okazoj ne nur por pridiskuti internacie “sian” specialaĵon, sed ankaŭ por plivastigi siajn interesigojn en aliaj kampoj.

Ekskurslinioj jam skizitaj

Kvankam ankoraŭ ne definitivaj, jam ekzistas skizoj pri la vojlinioj de du tuttagaj ekskursoj por partoprenantoj de la 60a UK. Unu kondukos la vojaĝantojn trans la markolon al Svedio kaj tra la sveda regiono Skanio, dum la alia celas al Fredensborg en Nord-slando (Danlando). Plenaj detaloj kaj mendiloj aperos en la Dua Oficiala Bulteno, ekspedita al la aliĝintoj de la Kongreso en februaro.

Blinduloj en Hillerød

La 43a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos en Hillerød, Danlando, de la 20a ĝis la 26a de julio 1975, tuj antaŭ la Universala Kongreso en Kopenhago. Detaloj sekvos.

Infanoj en Hellerup

La 15a Internacia Infana Kongreseto okazos en la Internacia Lernejo kaj Infanvartejo de Bjørn, en Hellerup, sub gvido de s-ino Karen Bjørnsby, kiu estris la unuan kongreseton en 1956, okazintan samloke.

Atentu la limdaton!

Se vi ne jam aliĝis al la jubilea Universala Kongreso, atentu bone, ke la kotizoj plialtiĝos post la 31a de decembro 1974. Kongresano individua membro de UEA (MA), ekzemple, pagas ĝis tiu dato nur 78,— gld., sed poste — 93,— gld.! Zorgu, do, ke viaj aliĝilo kaj pago estu forsenditaj antaŭ la jarfino.

Ankoraŭ plia karavano

Karavanon al Kopenhago — jam la kvaran — anoncas la Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio. La vojaĝo (per fervojo) daŭros de la 24a de julio ĝis la 4a de aŭgusto. La prezo (ĝis la fino de decembro 5 400 forintoj — poste 6 000 forintoj) inkluzivas la aliĝkotizon al la 60a UK, hotelrestadon kaj ĉiujn manĝojn en Kopenhago.

LA 31a INTERNACIA JUNULARA
KONFERENCO DE TEJO
1975 07 19 – 07 26

Fredericia, Danlando

Adreso: La 31a IJK,

Christian Lauridsen, Østergade 43,
DK-7430 IKAST, Danlando.

Sur la dana vojkruciĝo

KELKFOJE, kiam oni ĝustatempe ne faras la decidon pri la sekvanta Universala Kongreso, kiel okazis ĉi-jare, TEJO estas en sufiĉa embaraso, ĉar ĝi dum kelkaj semajnoj aŭ monatoj devas trovi la sekvantan lokon de sia jara ĉefaranĝo, pro la fakto, ke tiaj aranĝoj dependas de la loko, en kiu okazas la Universala Kongreso. Ĉio ĉi bele pruviĝis tuj post la hamburga kongreso, kiam Dana Esperanto-Junularo, la landa sekcio de TEJO, subite frontis iaspecan devon organizi la 31an Internacian Junularan Konferencon ie en Danlando. Oni unue traktis la eblecojn, ke la Konferenco okazu en Herning, pri kio ankaŭ ni raportis (v. la oktobran numeron, p. 171), sed, kiel ni anoncis en la novembra numero (p. 195), la verŝajna gastiganto de la 31a IJK tiam fariĝis Fredericia.

Nun estas tute certe, ke la 31a IJK okazos en Fredericia, inter la 19a kaj la 26a de julio 1975. La urbo de la venontjara ĉefaranĝo de TEJO estas la plej grava fervoja nodo de Danlando, kio supozigas, ke ĝi estas facile atingebla. Ĝi situas sur la orienta bordo de la duoninsulo Jutlando, la ĉefa parto de la dana teritorio. Kvankam Fredericia nombras iom malpli ol 50 000 loĝantojn, ĝi ĝuas la famon havi la plej grandan Esperanto-societon en Danlando, kio iasence garantias glatan organizan funkciadon de la 31a IJK.

La organizantoj de la Konferenco antaŭvidas, ke la ĉeftemo de la aranĝo estos "Kultura interŝanĝo". Kiel kutime, la nombro de partoprenantoj en la 31a IJK estas limigita per la kapacitoj de la kontraktitaj ejoj, kion bone spertis la lastmomentaj aliĝintoj al la ĉi-jara IJK en Münster, al kiuj la organizantoj ne povis garantii loĝeblecon en la konferenca urbo.

Pro tio, LKK de la 31a IJK petas kiel eble plej baldaŭan aliĝon. Depende de la aĝo, membreco en TEJO/UEA kaj aliĝdato, la kotizoj estas fiksitaj tiel, ke ili en la unua aliĝperiodo (ĝis la fino de 1974) sumas inter 250 kaj 325 danajn kronojn. Aliĝilojn kaj ĉiujn informojn pri la Konferenco petu ĉe: La 31a IJK, Christian Lauridsen, Østergade 43, DK-7430 Ikast, Danlando.

NOVA SEMINARIO DE KER:

La neceso reekzameno

EN LA KADRO de la 18a Internacia Seminario de GEJ, kiun ni anoncis en la novembra numero de nia revuo (p. 195), la Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO aranĝas sian novan seminarion. Ion similan KER faris ankaŭ pasintjare ligante sian seminarion "Estonteco de Eŭropaj Lingvoj kaj Kulturoj" al la 17a Internacia Seminario de GEJ, okazinta en Zierenberg (v. la februaran numeron de nia revuo, p. 30). Se tiu ligiteco de la du aranĝoj, okazontaj en Paderborn (FRG), inter la 27a de decembro 1974 kaj la 3a de januaro 1975, ne estas novaĵo, tiam la temo de la ĉi-foja seminario de KER estas tio: "Ekstera agado de TEJO – kial, kiel, kien?".

Kiel ni jam plurfoje atentigis, KER estas la plej aktiva parto de TEJO kaj samtempe la ĉefa portanto de tiu nova spirito de aktiva neŭtraleco, kiu en la junulara sekcio de UEA manifestiĝas dum la lastaj jaroj. Post pluraj sukcesaj aranĝoj, kiuj okupiĝis ĉefe pri la demandoj de la lingva kaj kultura imperiismo kaj pri la rolo de la Esperanto-movado en la kontraŭbatalo de tiuj fenomenoj de la moderna vivo, la seminario en Paderborn celas resumi la ĝisnunan aktivecon kaj tiri el ĝi la necesajn konkludojn kaj lecionojn por la plua agado de KER kaj TEJO. Tiu resumo montriĝis necesa ankaŭ por respondi al tiuj, kiuj – almenaŭ laŭ nia opinio – senbaze kritikas la aktivecon de KER kaj ofte misinterpretas ĝiajn celojn.

Al la seminario de KER en Paderborn oni povas aliĝi ĉe la sama adreso, kiu servas por la aliĝoj al la 18a Internacia Seminario de GEJ: Eberhard Schlumberger, Neuffenstr. 7, D-7920 Heidenheim, FR Germanio.



EL LA FOTO-ALBUMO DE LA 30a IJK (Münster, FR Germanio): Unu el la plej "ekzotikaj" partoprenintoj estis So Gil-Su el Suda Koreo. Kvankam li (sur la foto maldekstre) neniam antaŭe ĉeestis grandan internacian aranĝon, lia lingvo-uzo ravis ĉiujn. Dekstre staras la hispano L. de Yzaguiere. (Foto: G.Engländer).



Italio

- La svisa pianistino Danielle Béguin (nia foto pruvas, ke ŝi ludas ankaŭ aliajn instrumentojn) gastis antaŭ nelonge en Triesto kaj kelkaj najbaraj lokoj en Italio kaj Jugoslavio. Dum siaj koncertoj, la artistino regule alparolis la publikon en la Internacia Lingvo, kio siavice vekis interesiĝon kaj multajn informpetojn pri Esperanto. Krome, la Triesta Esperanto-Asocio en oktobro komencigis specialan Esperanto-kurson por infanoj kaj preparas sin por landlima renkontiĝo (venos ankaŭ jugoslavoj) la 15an de decembro en Triesto.

Aŭstrio

- Laŭ cirkulero de Aŭstria Esperantista Federacio, en Vieno nun funkcias entute 9 kursoj de la Internacia Lingvo, organizitaj de la lokaj filioj de AEF. Kvin el tiuj kursoj estas por komencantoj, kaj kvar por progresintoj.

Brazilo

- Esperanto-Asocio de San-Paŭlo aranĝis meze de oktobro ĉi-jare simpozion pri la informado pri Esperanto. La kunveno diskutis interalie ankaŭ proponojn aktualigi la Principaron de Frostavallen. Unu el la proponoj pledas, ke la Principaro pli forte akcentu la kunlaboron kun Unesko kaj la kontribuon de la Movado al la idealoj de UN kaj Unesko.

Germana Dem. Respubliko

- Laŭ informoj el Berlino, la Esperanta eldono de la fama romano *Nuda inter lupoj* de B. Apitz, aperinta en marto ĉi-jare, komence de novembro jam elĉerpigis ĉe la eldonejo. Konsiderante la eldonkvanton de 8 000 ekzempleroj, tio ĉi verŝajne estas rekordo en la historio de la Esperanta literaturo. Tiu ĉi sukceso sendube ŝuldiĝas grandparte al la intensa propagando, kiu antaŭis la eldonon de la verko (v. recenzon en nia novembra numero, p. 190).

Nederlando

- En la ĵurnalo *Arnhemse Courant*, meze de septembro ĉi-jare aperis artikolo, kiu ironiis pri Esperanto. La loka klubo reagis letere (aperis tri tiaj reagoj) kaj per invito al la ĵurnalistoj viziti klubkunvenon. Li venis kaj poste verkis afablan raporton pri la kunveno. Sed, la klubo aperigis ankaŭ anonceton en la oktobra numero de nia revuo, invitante, ke oni skribu al la ĵurnalistoj, kiu "scivolas ĉu ekzistas parolantoj de Esperanto". Jam komence de novembro, la ĵurnalistoj raportis en sia regula rubriko, ke la redakcio ricevis "grandegan staplon da poŝtaĵoj", unue el Belgio, Britio kaj FR Germanio, kaj iom poste "pakaĵojn da poŝtaĵoj" el la skandinaviaj landoj, Ĉeĥoslovakio, Usono, Soveta Unio kaj Japanio. La reagintoj meritas ankaŭ nian dankon.

Belgio

- Prenante la parolon en la 18a Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazinta antaŭnelonge en Parizo, la belga ministro pri instruado (nederlandlingva fako) emfazis la rolon de Unesko sur la kampo de scienca kunordigado. Li atentigis, ke en Belgio multaj sciencaj studoj estas farataj en la nederlanda lingvo, sed ili restas nekonataj pro la fakto, ke tiu lingvo ne estas multe parolata ekster la limoj de Belgio kaj Nederlando.

Usono

- La lasta eldono de *Encyclopedia Americana* enhavas pli ol 1 000-vortan artikolon pri Esperanto, kiu skizas la strukturon, historion kaj la nunan staton de la Internacia Lingvo. La artikolon verkis d-ro Humphrey Tonkin.

Urugvajo

- Kvankam Montevideo okupas honoran lokon en la historio de la Esperanto-movado, kaj malgraŭ tio, ke Urugvaja Esperanto-Societo jam antaŭ multaj jaroj ekklopodis, ke la ĉefurbo honorigu la Internacian Lingvon per nomigo de iu strato laŭ ĝi, tio okazis nur en oktobro ĉi-jare. Efektive, la tiurilata dekreto de la urba konsilantaro portas la daton de la 7a de novembro 1972, sed ĝi estas komunikita al UES nur nun. S-ro V. Luis Cao, komisiito pri informado ĉe UES, resumas en la informo sendita al ni, ke nun Urugvajo estas la tria lando en Suda Ameriko, kiu havas straton "Esperanto". Laŭ li, en Argentino ekzistas 4, kaj en Brazilo 50 stratoj aŭ placoj, kiuj portas la nomon de la Internacia lingvo aŭ de d-ro Zamenhof.

Soveta Unio

- Dum la lastaj monatoj ĉiam pli ofte en la soveta gazetaro aperas longaj artikoloj pri la Internacia Lingvo. Meze de septembro ĉi-jare, en Siktivkar (aŭtonoma regiono Komi, nordoriento de la eŭropa parto de Soveta Unio) la gazeto *Molodjoj severa* (eldonkvanto 85 000 ekz.) aperigis longan informan tekston de O. Ŝtraler, kiu gvidas Esperanto-kursojn ĉe la Universitato de Siktivkar.

- Kiel kutime dum la lastaj jaroj, en la kadro de la jarfinaj seminarioj de MLA (Modern Language Association), la 27an de decembro ĉi-jare okazos du seminarioj pri Esperantaj temoj. La seminariojn gvidos d-rino Margaret Hagler (Esperanta antologio de usona literaturo) kaj prof. Julius Balbin (Interlingvistiko kaj la socia portanto de Esperanto).

Gazetaro

- Kiel raportite en pluraj movadaj periodaĵoj, dum la elektokampanjo por la prezidanto de Francio, la tiama kandidatoj Mitterand kaj Giscard d'Estaing estis demanditaj ankaŭ pri la lingva problemo kaj Esperanto. En unu el siaj someraj numeroj tion prinotis ankaŭ *Newsweek*, unu el la plej prestiĝaj internaciaj magazinoj. Al tiu raporto letere reagis (*Newsweek*, 1974 07 22) s-ro A. Bourdeaux, tiama vicprezidanto de UFE.

Literaturo

- La renoma itala literatura premio "Picenum" ĉi-jare havis ankaŭ la Esperantan branĉon. Malgraŭ la problema funkciado de la itala poŝto, konkursis ĉ. 80 Esperantaj poetoj el la tuta mondo. En la branĉo originala poezio la unuajn tri premiojn gajnis Josip Velebit (Jugoslavio), Zora Heide (Danlando) kaj Vesna Skaljer-Race (Jugoslavio). La unuajn tri premiojn por la traduka poezio gajnis Carmel Mallia (Malto), Gaudenzio Pisoni (Italio) kaj M. Massarelli (Italio).

Instruistoj

- Inter la 8a kaj 10a de novembro, en la Universitato de Bristolo (Britio), okazis konferenco de la Eŭropa Asocio de Instruistoj (EAI). Kvindek da ĉeestantoj traktis, interalie, la lingvan problemon en EAI kaj en la Eŭropa Komunumo. Unu el la rezolucioj de la konferenco pledas, ke la Eŭropa Komisiono en Bruselo kaj EAI starigu studgrupon pordetale ekzameni eblajn solvojn de la lingva demando, inkluzive Esperanton. Tio ĉi ŝuldiĝas al la interveno de du ĉeestantaj esperantistoj, lernejestroj G. Leon-Smith kaj R.H.M. Markarian, ambaŭ el Londono.

- La estraro de la Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) konferencis komence de novembro en la Aŭstria Esperanto-Centro en Vieno. En la ampleksa tagordo gravan lokon okupis novaj lerneaj eksperimentoj kaj la eblecoj, ke Aŭstrio partoprenu ilin. El samtempaj kontaktoj kun la urbaj kaj ŝtataj edukaj funkciuloj, rezultis decido, ke elementaj klasoj en Vieno venontjare rajtos partopreni en la eksperimenta instruado de Esperanto.

Persone

Berceli

- Okaze de sia retiriĝo el la aktiva laboro en la hungara Esperanto-movado, s-ro Bela Berceli, kiu dum 10 jaroj estis ĉefsekretario de HEA, estas distingita per ora ordeno de la Hungaraj Sindikatoj.

Pool

- D-ro Jonathan Pool, la aganta direktoro de CED, antaŭ nelonge elektigis unua vicprezidanto de Esplor-Komitato pri Socilingvistiko en la Internacia Sociologia Asocio. Li estos organizanto de la programo pri socilingvistiko en la 9a Monda Kongreso de Sociologio (versajne en Tokio) kaj pretas tie konsiderigi kontribuadojn pri Esperanto kaj rilataj temoj.

Friis

- S-ro Lorenz Friis el Aabyhøj en Danlando ne plu gvidos la popularajn feriajn Esperanto-kursojn en Helsingör. Post 43 jaroj da organizado kaj gvidado de tiuj kursoj, ĉi-jare li decidis transdoni la taskon al aparta komitato konsistanta el aktivuloj de Helsingör kaj la najbara sveda urbo Helsingborg. Ĉi tiun decidon versajne influis ankaŭ la fakto, ke Dansk Esperanto-Forlag, eldonejo kiun estras s-ro Friis, lastatempe aktiviĝis per pluraj valoraj represo de klasikaĵoj el la Esperanta literaturo precipe intermilita.

Nekrologoj

AUGUSTE BROISE 1901 - 1974

En Nonancourt, Francio, forpasis la 12an de julio la direktoro de la Sekcio pri la Teknika Vortaro de la Akademio de Esperanto kaj de la Terminologia Centro de ISAE, ing. Auguste Broise. Li estis fervora verkinto de teknikaj vortaroj kaj nelacigebla kunlaboranto en la esperantista laborrondo terminologia. Ĉiam klopodante pliriĉigi la teknikan vortotrezoron, li distingiĝis pro sia agemo, sagaco kaj kritikemo. Pro tio li estis bonega kontrolanto de terminaraj malnetoj. Por la Teknika Terminologia Sekcio la forpaso de ing. Broise estas perdo preskaŭ nekompansebla.

H.G. WANNEMAKERS 1910-1974

La 12an de septembro ĉi-jare, mortis en Nederlando pastro H.G. Wannemakers, antaŭe profesoro pri teologio en Ĝakarto, Indonezio. Li aktivis ĉefe en IKUE; verkis predikojn, prelegojn kaj recenzojn, redak-

tis katolikajn periodaĵojn. Pluraj liaj tradukoj aperis en la serio "Dokumentoj el Romo" de IKI, kunlabore kun pastro H. Roosen. Li kun-aŭtoris kaj kuntradukis plurajn katolikajn librojn en Esperanto.

M. FERNÁNDEZ MENÉNDEZ 1889 - 1974

Honora Membro de UEA kaj honora prezidanto de Urugvaja Esperanto-Societo, Manuel Fernández Menéndez, forpasis en Montevideo la 8an de julio ĉi-jare. Hispandevena, li apartenis al la pioniroj de la Movado en Urugvajo. Li estis instruisto, lernejestro kaj profesoro en komerca altlernejo, aŭtoro de pluraj didaktikaj libroj hispanlingvaj. En la Internacian Lingvon li tradukis *Ariel* kaj *Fermentario*, kaj estas aŭtoro de *Lahomo sur sia vojo*. En 1954, dum la Unesko-Konferenco en Montevideo, s-ro Fernández Menéndez estis unu el la iniciatintoj de la Universala Ekspozicio tie.

A.G. WILTSHIRE 1892-1974

Unu jaron post sia edzino Lila, la 31an de aŭgusto forpasis Arturo Wiltshire, vic-ĉefdelegito de UEA en Nov-Zelando. Dum sia multjara aktiveco en la Movado, li estis kasisto de NZEA, honora membro de la loka klubo en Auckland kaj delegito de UEA.

FRANK R. BANHAM 1898-1974

La 30an de aŭgusto forpasis en Melbourne, Aŭstralio, Frank Reginald Banham, kiu dum 45 jaroj redaktis la revuon *Aŭstralia Esperantisto* (antaŭe *La suda kruco* kaj *La rondo*). Li esperantistiĝis en 1921 kaj estis unu el la plej elstaraj agantoj en la aŭstralia Movado. Interalie, li kunlaboris en la *Enciklopedio de Esperanto*.

JOZEFO HÉRION 1897-1974

En Verviers, Belgio, la 12an de aŭgusto forpasis Jozefo Hérion, kiu la Internacian Lingvon lernis jam en la jaro 1914. Li gvidis multajn Esperanto-kursojn, prezidis la lokan klubon kaj plenumis funkciojn en la Delegita Reto de UEA depost 1937.

F. GOODLIFFE 1897-1974

Komence de novembro en Nottingham, Britio, mortis Frank Goodliffe, kiu en la Brita Movado aktivis depost la jaro 1924, kaj funkciis kiel delegito de UEA dum 35 jaroj. Inĝeniero laŭ la eduko, Goodliffe estis asekuristo kun propra kompanio en kiu la ŝildoj pri Esperanto ĉiam okupis okulfrapan lokon.

Oficiala Informilo

N-ro 484, 1974-10-31

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

HISP. SAHARO: Francisco Crespo. IRAKO: Husen M. Al-Amili. JAP: I. Katoŭ kaj f-ino Sizuka Yamasaki. NED: H.H.A. van Rijswijk.

MEMBROJ SUBTENANTOJ 1974

ITAL: 231 Aldo Torti.

SOCIETO ZAMENHOF 1975

NED: 1 J. Flach. BELG: 2 E.L.M. Wensing. SVED: 3 Rolf Nordström.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1975-02-15 neniu membro pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

BELG: Andrée Orsolini, D Charleroi; C. Vanbiervliet, FD Kortrijk. BRAZ: G. Grattapaglia, D, R. Diniz, VD, U. Grattapaglia kaj S. Silva, FD-oj Alto Paraiso; G. Grattapaglia, FD Brasilia. ĈEĤOSL: J. Kromholc, FD Bratislava. DANL: L. Kristensen, JD Aarhus; V. Frausing, JD Odense; Åge Skovrind, JD Tåstrup. FRANC: Madeleine Gibeze, FD Crest; Dominique Despiney, JD Le Perreux-sur-Marne; G. Prévot, FD Nantes; Renée Triolle, D kaj FD Roubaix; Aimée Rose, D Sanilhac-Uzès; G. Maigret, D Toulon. FRG: E. Woite, D Darmstadt; J. Wiegand, D Freiburg im Breisgau; Peter Hermanns, FD

Wallenhorst. GDR: K. Klimt, VD kaj FD Quedlinburg. HISP: Adonis Gonzales Meana, VD Gijón. JUG: M. Bedalov, FD Split. NED: Ineke Emmelkamp, VD Groningen; C. Nelson, D Zwijndrecht. PORT: Antonio Almeida, FD Amadora; Antonio De Macedo, FD Lisboa.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en Jarlibro 1974, Unua Parto:

BELG: Borgerhout, FD (edukado) kaj (naturismo); Verviers, FD (komerco). BRAZ: Resende, D kaj FD (psikologio). ĈEĤOSLOV: Jihlava. DANL: København, FD (transporto). FRANC: Souvigny. FRG: Bochum, JD; Hagen; Osnabrück. HISP: Oviedo. POLL: Świnoujście.

DONACOJ 1974 (Gld.)

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: Germain Pirlot 2,89. Japanio: Ivao Katoŭ 200,—. Sumo ĝisnuna 355,51. FONDAĴO CANUTO: Nederlando: E. Burg 2,50. Sumo ĝisnuna 2 529,04. ĜENERALA KASO: Britio: Ges-roj T. Fraser 57,35. FR Germanio: G. Kalicinski 7,50. Hispanio: L. Mimó 50,—. Nederlando: Dick Ponti 50,—. Sumo ĝisnuna 4 296,39.

TEJO Patronaj Membroj A: 23 J. Balbin, Usono; 24 Mario Bardini, 25 Giorgio Barelli, 26 Emerico Marcetta, 27 Enrico Mingo, Italio.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Nederlanda organizo volonte ricevos raportojn pri t.n. nekonataj flugantaj objektoj. G. Duvis, Kemphaanlaan 3, Heemstede, Nederlando.

Loteribiletojn (nevalidaj) Ludkartojn (kuriozaj) sendu kontraŭ deziro el Svedujo: Sune Ahlm, Sandbergsväg 14, S-460 60 Vargön.

Junulo, kiu lernas Esperanton, volas korespondi kun junuloj ĉiulandaj inter 10- kaj 20-jaraj. Sendu leteron aŭ poŝtkarton al: Lars Göran Olson, Blidvädersgatan 56, S-417 30 Göteborg, Svedujo.

Kelkaj petintoj pro konfiskado ne ricevis nian kristanan literaturon. Sciu, ke ni akurate priatentis vin kaj volonte ricevos novan skribaĵon. Esperanto-Misio, S-694 02 HALLSBERG 2, Svedujo.

Esperanta kalendaro 1975: Ses folioj 33x88 cm kun tradiciaj koreaj pentraĵoj. Kontraŭ \$2,50 aerpoŝte liveras Gim Taekeng, poŝtgirkonto Seoul-1327, Suda Koreo. Antaŭmendoj por 1976 akceptataj.

Granda fotkonkurso kun ekspozicio okazos en marto. Formato 30x40 cm. Nigra-blanka. Temo: aspekto aŭ sceno de via lando. Fotoj ne resendotaj. Interesaj premioj. Sendu maksimume 5 fotojn al: Maison des Jeunes. Concours photos "ESPERANTO", F-76190 Yvetot, Francio. Aldonu karteton 5x10 cm kun titolo kaj lando.

Indekso

1974

67a jarkolekto

Adamson 110
Afriko 128, 203
Aisberg 97, 198
Akademio de Esperanto 90
Albault 137
Aldsten 40
Aliteracio 14
Angla lingvo 185
Antaŭ 50 jaroj 175
Araba lingvo 3
Arandjelović 30
Argentino 96
Aŝvinikumar' 177, 193
Auld 113, 126, 191
Aŭstrio 38, 96, 137, 215
Aŭtomobilistoj 197

Baghy 34
Bakalov 191
Balda 40
Banham 217
Beaucaire 32
Belgio 17, 116, 196, 202, 215
Benczik 26, 94
Behrmann 27, 72, 177, 197
Berceli 216
Berger 177
Bernard 12, 53, 133
Bibliotekoj 117
Bokarev 173
Boothroyd 165
Bormann 67, 101, 177, 185
Borsboom 54, 130, 167
Boulogne, P. 60
Boulton 38, 50, 77
Bouvier 78
Brazilo 38, 116, 137, 196
Britio 76, 96, 116
Broadribb 53
Broise 216
Bulencea 207
Bulgario 17, 38, 57, 76

Carlén 183
Carlevaro 32

Cash, R. 133
CED 70, 108, 208, 209
Collinder 137
Conterno 74, 91
Corsetti 203


Ĉeĥoslovakio 38, 76, 177, 195
Ĉilio 116
Ĉinio 6, 57, 127, 136

Dalsem, van 77, 191
Danlando 168
Daŝgupto 97
De Diego 54
Deer 29
Dér 118
De Smet 14
Diplomatia 122, 144, 161
Diskoj: vidu Eldonaĵoj
Divjanović 57
Dolapčiev 192
Domingues 118
Drezen 130
Duc Goninaz 91, 112, 173

Edukado 23, 57, 128, 186
Eksiĝoj 141, 143, 146, 147, 149, 155, 179, 182
Ekspozicioj 129
Ekzameno Internacia 49
Eldona aktiveco 77, 104, 197, 216
Eldonaĵoj:
Amuzaj dialogoj en Esperanto 92
Anatomio de la homa korpo 32
Arbo de la sciado, La 53
Bonhumora injektilo 94
15 komedietoj 132
Ekumenismo kaj internacilingva problemo 33
Elektitaj verkoj, vol. II (Maŭ) 94
Elementa ekologio 174
El popola Ĉinio 177
Esperanta-rusa vortaro 173

JEN LA
SOLVO
DE LA
PROB-
LEMO

kiel teni
en bona
ordo viajn
ekzempler-
ojn de la
revuo:



bela, fortika bindilo por 11
numeroj de "Esperanto".
Prezo: 9,— (por Nederlando
10,44) gld. plus sendo 10%.

Esperanto en lingvolaboratorio 72
Esperantonimoj 12
Espéranto sans peine, L' 91
Esploroj 112
Eŭropa dokumentaro 166
Finalo '73 113
Floroj sen kompar' 191
G. Marin vizitas sian hejmon – la mondon 133
Hungara vivo 177
Internacia komerca-ekonomika vortaro 93
Je parle espéranto 52
Juna amiko 90
Junulejo; La buĉejo 54
Kalejdoskopaj varietoj 174
Kantanta mia bird' 191
Katolika terminaro 132
Komputil-teknika vortaro 111
Koncize 171
Konsideroj 210
Krimo de l' milito, La 54
Kun siaspeca spico 32
Kvindek jaroj de Esperanto en Oomoto 112
Lanternisto kaj aliaj prozaĵoj, La 113
Literatura mondo (represo) 126
Manlibro pri transporto de fluidaĵoj 132
Melo antaŭ tribunalo 34
Morso-klubo 52
Naciaj malplimultoj en VDR, La 13
Ni kaj Ĝi (Eseoj III) 73
Nikolaj Rytikov – Elektitaj eroj 133
Ni laboru kaj esperu! 173
Nova geografio 173
Noveloj de Lusin 211
Nuda inter lupoj 190
Patroj kaj filoj 53
Prefiksitaj vortoj el Zamenhof 210
Rakontoj kaj poemoj 91
Roseroj, melodioj kaj tekstoj 191
Salome 12
Secondary School Esperanto 33
Skota legendaro 13

- Terminaro por bibliaj studoj* 53
Viktimoj; Sur sanga tero 34
Vojo kaj vorto 74
 Elekto de komitatanoj B 39, 122, 149, 199
 Encilopedio de Esperanto 14, 50, 110, 188
 Ergoto de Bonaero 94, 174
 Esperanto en Perspektivo 71, 109, 183, 208
 Eŭropa Esperanto-Centro 84, 166
 Eŭropo 116, 166
 Eynde, van 140

 Fernández Menéndez 216
 Fervojistoj 117, 177
 Filatelo 177
 Filipinoj 136
 Filmo 97
 Financo 18, 82, 105, 162, 177, 181, 202, 208
 Finnlando 43, 96, 186, 196
 Fondaĵo Canuto 181
 Fotografio 206
 Francio 17, 76, 136, 176, 196
 Fresco 140
 Friis 216

 Gacond 52
 Galloway 13
 Gasse 118
 Gastlaboristoj 23
 Gazetaro 121, 163, 202, 216
 Geoghegan 188
 Geologio 137
 Germana DR 196, 215
 Germanio FR 27, 30, 38, 57, 96, 116, 136, 176, 196
 Germana lingvo 43
 Gjivoje 12, 173
 Goodliffe 217
 Gregor 53, 132, 210

 Haazen 210
 Hagler 117
 Harangozo 119
 Harry 38, 97, 122, 198
 Helpo al komencantoj 102
 Hérion 217
 Hill 191
 Hinda Unio 17, 104, 166
 Hispanio 38, 136, 197
 Historio 137
 Homaj Rajtoj 41
 Hungario 26, 85, 96, 136

 ILEI 46, 216
 Imbert 10
 Informado 38, 117, 215
 Instituto Hodler 105
 Instruado 43, 83, 102, 186
 Instruistoj 43, 46, 197, 216
 Interlingvistiko 25, 75, 207, 209, 216
 Internacia seminario de GEJ 30, 195

 Internacia Somera Universitato 149, 194
 Interpretado 44
 Islando 176
 Israelo 116, 197
 Italio 76, 177, 215, 216

 Japanio 31
 Jonas 17, 81
 Jugoslavio 31, 38, 76, 136, 197, 207
 Junularo 30 (vidu ankaŭ TEJO)
 Juskiewicz 119

 Kalendaro 37, 99, 131, 212
 Kalocsay 14, 177
 Kanado 76, 172, 176
 Kaŭakami 77
 Kawasaki 210
 Kehlet, E. 52
 Kenjo 185
 Kolker, B. 129
 Kolombio 57
 Komerco 117
 Komuna merkato 45
 Komunikado 57, 103, 106
 Konferencoj 46, 70
 Kongresoj:
 UK 59a, Hamburg 15, 35, 47, 55, 66, 71, 98, 115, 135, 141-160, 163, 182, 184
 UK 60a Kopenhago 148, 168, 170, 194, 213
 IJK 30a Münster 16, 36, 75, 95, 114, 134, 158
 IJK 31a 171, 195, 214
 Postkongreso Kronach 88
 Kongresoj aliaj:
 Itala 137
 Kanada 172
 Movado Freinet 85
 Norvega 172
 SAT 167
 Konkursoj:
 Belartaj 155, 190, 206, 210
 Oratora 15, 56, 155
 Kordylewski, L. 174
 Koreo 96
 Korytkowski 33
 Kotizoj 179
 Kozlevčar 13
 Kubo 176
 Kurisu 6
 Kuroda 190
 Kursoj 26, 27, 97
 Kurucz 90
 Kutas 198
 Kvašňák, R. 211

 Laborplano 86, 123, 171, 201, 203
 Landnomoj 90
 Lapenna, E. 113, 132
 Lapenna, I. 1, 24, 41, 47, 61, 86, 122, 123, 141, 146, 150, 182, 209
 Laste aperis . . . 13, 34, 74, 94, 113, 133, 175, 192, 212

 Lavrentjev 119
 Lernolibroj 197, 207
 Lesznai 191
 Leteroj de legantoj 14, 51
 Lewine 33
 Libro 28 (vidu ankaŭ Eldonaĵoj)
 Lienhardt 92
 Lingva diskriminacio 41, 86, 203
 Lingva problemo 3, 5, 11, 30, 104, 108, 161, 165, 171, 185, 203
 Lingvistiko 198, 207
 Lins 21, 94, 112, 210
 Literaturo 17, 117, 176, 177, 206, 215, 216

 Mackay 132
 Magnetofona Servo 29
 Malto 17
 Manceau 132
 Markarian 33
 Matematiko 192
 Maul 33
 Medicinistoj 65
 Membro-statistiko 58, 138
 Milojević 3, 49, 102
 Minnaja, L. 24
 Möllestad 51
Monda Lingvo-Problemo, La 82, 209
 Money, E. 161
 Moritz 27
 Movado 1, 21, 61, 69, 101, 102, 127, 147, 148, 150, 166, 167, 181, 182, 183, 184, 201, 202
 Munniksma 93
 Muzeoj 137
 Muziko 151, 154, 197

 Nakayama 32
 Natalis 119
 Nederlando 38, 136, 215
 Neergaard 177, 213
 Nogueira 74
 Norvegio 172
 Noveljić 140
 Nov-Zelando 197

 Oficiala Informilo 18, 39, 58, 78, 99, 118, 138, 178, 199, 217
 Ojalo 110
 Oomoto 42, 112, 198

 Pakistano 42
 Pancer-Tuksar 117
 Parker 78
 Parlamentoj 31, 161
 Pasporta servo de TEJO 56
 Pausback 132
 Peruo 134
 Pettyn 57
 Podlinski 60
 Politiko 77
 Pollando 38, 75, 76, 137, 198
 Pool 209, 216
 Portugalio 136

Poŝtmarkkolektado 37
Pupteatro 10

Quirke 34

Radio 19, 39, 59, 70, 79, 119, 138,
163, 180, 198

Ragnarsson 112, 177, 206

Rasa diskriminacio 41, 86

Recenzoj (kondiĉoj) 12

Recenzoj: vidu Eldonaĵoj

Régulo Pérez 182, 197, 198

Religio 77, 177, 197

Rezolucioj 142, 143, 145

Richardson 188

Rotkviĉ 73

Rumanio 83, 207

Rust 53

Rychlý 132

Sadler 82

Sárosi 17

SAT 167

Schlüter 111

Schwartz 32

Scienco 77, 85, 149

Semajno de Internacia Amikeco 48,
183

Setälä 92

Shinoda 65

Skoltoj 171

Sonnenfeld 59

Soveta Unio 57, 76, 95, 129, 176,
215

Speleologio 77

Sporto 97

Starr 137

Stefančić 140

Stefanović 34, 190

Stenografio 57

Støp-Bowitz 174

Studentoj 26, 75

Stuit 78

Suda Vjetnamo 116

Sullivan 33

Svedio 197

Svislando 176, 196

Szathmári 188

Szerdahelyi 72

Ŝalamon 51

Ŝibajama 51

Tárkony 53

Teatro 152, 153

TEJO 95, 114, 134, 157, 171, 195

Televido 128, 163

Thierry 52, 91

Timmerman 60

Tonkin 50, 143, 147, 176, 201, 215

Tradukoj 97, 176

Transpaga problemo 181

Tudela Flores 119

Turismo 17, 198

Tvarožek 12, 175, 177

UEA 61

Estraro 2, 82, 148, 162

Komitato 148

Ueyama 210

Unesko 23

Universitatoj 31, 38, 77, 83, 97, 137

Unuiĝintaj Nacioj 3, 5, 41, 108

Urugvajo 215

Usono 31, 48, 68, 69, 76, 96, 116,
177, 215

Venture 194, 206

Verkistoj 17

Vortaroj 117

Wannemakers 216

Waringhien 73, 173

Wells 93, 121

Wiltshire, A.G. 217

Wiltshire, L. 40

Witkowski 78

Woessink 18

Wood 13, 25, 31, 51, 82, 117

Wüster 38

Zamenhof 173

Zairio 97

Ĉina monata gazeto en Esperanto

El Popola Ĉinio

varbas abonantojn de 1975

EL POPOLA ĈINIO 中国新闻
10
1974



Abonprezoj:

1-jara 6,— gld.

2-jara 9,— gld.

3-jara 12,— gld.

(Por Nederlando
aldoniĝas enlanda
imposto 4%)

Abonu ĉe:

UEA, Nieuwe
Binnenweg 176,
Rotterdam-3002,
Nederlando
(pĉk 37 89 64)

aŭ rekte ĉe la Esperanta sekcio de

GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)

P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.


Bonvole abonigu ankaŭ viajn amikojn.

Senpagaj specimenoj akireblaj laŭ peto.

LA TORNISTRO

BONA DISTRO - 1975

Nº 3



Jam aperis Nº 3
kun tre varia
enhavo ilustrita.
Ankaŭ aĉetebblas
Nº 1 kaj Nº 2.
52 paĝoj, 22 cm.
Prezo: po 5 gld.
Mendu ilin ĉe
UEA, kaj ankaŭ la
jenajn verkojn
eldonitajn de Ar-
gentina Esperanto-
Instituto:

LA KRIMO DE L' MILITO, 212p. 15cm.
Prezo: 9 gld. **KALEJDOSKOPA VARIETEO**,
prozo kaj poezio de Ergoto, 160p. 17cm. Prezo:
9 gld. **JUNULEJO** (Rememoroj de gimnaziano)
kaj **LA BUĈEJO**, 128p. 17cm. Prezo: 9,54 gld.
NIAJ PLEJ GRANDAJ VERKISTOJ (de Eo),
EKFLORADO ĈE PLATA RIVERO (pri la
Eo-movado), 112p. 17cm. Prezo: 7,50 gld.
LAŬTEMA VORTARO (Esperanto-angla-
franca-hispana), 234p. Prezo: 10,20 gld. **BON-
HUMORA INJEKTILO** (120 amuzaj anek-
dotoj kaj spritaj dialogoj) de Ergoto de Bonaero,
192p. 17cm. Prezo: 12,75 gld. **LA FRIPON-
ETO DE TORMES** (pikareska novelo), 72p.
17cm. Prezo: 6,36 gld.

REVENIS KRUKO KAJ BANIKO EL Bervalo

ĴUS APERIS la dua eldono de la jam
(fi)fama anekdotaro de Louis Beaucaire.

Tiu vigle ilustrita originala ridincitilo kun
la subtitolo "Maldecaj anekdotoj por
neprudaj legantoj", tiel furoris tra la
mondo, ke la unua eldono el 1970 jam
post nuraj ses monatoj estis havebla nur
prunte aŭ ŝtele.

Prezo: 16,— (por Nederlando 16,64) gld.
Mendu ĉe UEA aldonante 10 procentojn
por la sendokostoj.

ITA 1975
KANADA
KONGRESO
EN
KALGARIO
(apud la bela Roka Montaro)
1975
BENVENON AL VI!

JUNIO 28(SAB.), 29,30


(Kalgaria Stampedo — rodeo — Julio 3-12)

KONTRAŬ 1 RESPONDKUPONO
PETANTOJ POVAS AERPOŝTE RICEVI
ALIĜILON KAJ PROSPEKTON.

**KALGARIA ESPERANTO KLUBO,
3019 HAMPTON CRESCENT S.W.,
CALGARY, ALBERTA,
CANADA. T3E 4R1**



DINNY, LA DINOSAŬRO
en la Dinosauria Parko



LA KALGARIA TURO
190 metrojn alta



La lasta manuskripto de d-ro Zamenhof

H.C. ANDERSEN

FABELOJ

(IV-a volumo)

Tradukis d-ro L.L. Zamenhof

53 originalaj desegnaĵoj de
A. Uniechowski
244 paĝoj

Prezo: 12 gld. aŭ egalvaloro
plus sendokostoj 10%.

Eldonis: Heroldo de Esperanto

Rue de la Reinette 13 (Pippelingstr.),
B-1000 Bruselo

Mendu ĉe la eldoninto aŭ ĉe UEA



SAS pli ol simple sidloko ...

SAS
SCANDINAVIAN AIRLINES

Skandinavia Aerlinia Sistemo: oficiala flugkompanio de la 60-a Universala Kongreso